3-a Jaro, N-o 125—126 APERAS  SEMAJNE 19. Februaro 1927

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY
14, Avenue de Corbéra, Paris-XIIe

Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, Rue Boyer, Paris-XXe

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig O 27

LABORISTARO, MALFERMU LA OKULOJN!

Ni staras ĉe sojlo de novaj militoj!

Nur en 1918 finiĝis la terura imperialista milito, daŭrinta 4 jarojn, almozuliginta Eŭropon kaj forportinta al tomboj milionojn da junaj, belegaj vivoj.

Pasis 8 jaroj, kaj nun oni preparas novan militon, pli grandegan, pli teruran. Jam nun oni povas ekvidi en tiu-ĉi preparado du tendarojn, du militontojn.

De unu flanko Ameriko kontraŭ Britio (kaj ankaŭ reciproke) preparas militon por novaj vendejoj por siaj varoj. De alia flanko komencas interbatalo de Anglio kaj Francio. Francan kapitalistaron subtenas Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Polio kaj Hispanio. Anglion subtenas Italio, Grekio, Norvegio, Rumanio, Estonio kaj Latvio. Ne distingebla ankoraŭ estas por estonta militspektaklo rolo de l' germana aktoro.

Tiujn-ĉi konkludojn pruvas lastaj amikeckontraktoj (pri amikeca kunrabado de kontraŭbatalonto) inter registaroj de ĉiuj suprenomitaj landoj.

Kaj ankaŭ pri tio parolas al ĉiu klaskonsciulo lastaj okazintaĵoj en Litovio (faŝista revolucio) kaj Polio (subpremigo de kelkcentmila blankrusa nacia organizo). Litoviaj kaj Poliaj lernantoj de s-ro Mussolini ludas antaŭspektaklan melodion por baldaŭ komencenda militdramo.

Kaj ne nur faktoj parolas, ankaŭ la ciferoj. Eĉ ili pli bone notas alvenon de la milito.

Jen ekzemplo: Ameriko, Anglio, Francio kaj Italio elspezis por militpreparoj

en 1913 jaro	993 000 000	dolarojn
en 1923 jaro	1 743 000 000	dolarojn
en 1926 jaro	1 768 000 000	dolarojn

Finnlando, Estonio, Latvio, Polio kaj Rumanio elspezis por samaj celoj

en 1923 jaro	185 000 000	dolarojn
en 1926 jaro	215 000 000	dolarojn

Samaj landoj havis en siaj armeoj

en 1923 jaro	479 000	soldatojn
en 1926 jaro	533 000	soldatojn

Samaj landoj pligrandigis sian aerŝiparon

en 1923 jaro	280	aeroplanoj estis
en 1926 jaro	510	aeroplanoj estis

Krom tio, samaj landoj (krom Rumanio) havas preparitajn por milito 651 000 armitajn faŝistojn.

Kaj la antaŭenomitaj Ameriko, Britio, Francio kaj Italio kune prezentas jenajn ciferojn:

Jaroj	*Kvanto de soldatoj en ĉiuj 4 armeoj*	*Kvanto de aeroplanoj*
1913	1 613 000	150
1923	1 681 000	2400
1926	1 821 000	3550

Je 208 000 soldatoj pligrandiĝis armeoj de la plej grandaj rabuloj-landoj (Ameriko, Anglio, Francio, Italio). Preskaŭ duobliĝis iliaj militelspezoj. Pri kio parolas la ciferoj? Novan neesprimeblan militegon preparas malantaŭ la dorso de Laboristaro "pacamaj" kapitalistaroj, kun la intenco eluzi dum ĝi ĉiutage elpensataĵn novajn venengasojn kaj aliajn terurajojn.

Ĉiu sennaciulo, ĉiu klaskonscia laboristo devas diri al kapitalistoj:

— Ne! Laboristaro ne volas militon! Vi trompis nin en la jaro 1914-a, sed ne trompos en la 1927-a!

Kaj se tamen la milito eksplodos, la Laboristaro devos turni preparigatajn de burĝaro bajonetojn ne kontraŭ siajn alilandajn klasfratojn, sed kontraŭ la preparigantojn mem. *(5241)*



La strikmovado en Ĉinio

La okazintaĵoj dum majo 1925 (la mortpafado al laborista manifestacio en *Ŝanghai)* montris la grandan signifon de *Ŝanghai* en la ĉinia laborista movado. Ĉi-urbo, estante la plej grava laborista centro en Ĉinio, staras kiel antaŭgvardio de l' Proletaro ĉinia kaj dissendas strikondojn tra la tuta lando.

Ĉi-signifon de *Ŝanghai* klarege komprenas la anglaj imperialistoj kaj ili speciale esploris la 1926-an strikmovadon tiean. La rezultoj estis presataj en "*Ĉinia Ekonomia Monatrevuo*" eldonata de angloj. Sendube, ke la ĉi-suba donata statistiko el tiu revuo emas malpligrandigi la nombron kaj gravecon de la strikoj, ĉar tia malpligrandigo estas en la intereso de la kompilintoj.

Laŭ ĉi-statistiko, dum la unua duono de 1926, *Ŝanghai* spertis 96 strikojn ĉe 106 fabrikoj, partoprenitajn de pli ol 91 000 laboristoj, inter kiuj ĉirkaŭ 5000 virinoj.

La esplorantoj devis konstati, ke nur en 33 okazoj la kaŭzo de la striko estis malkontento pri laborpago; aliokaze ĝi estis la malbona rilato inter la laboristoj kaj entreprenistoj. Grandan intereson prezentas la postuloj de l'strikantoj pri ĉesigo de korpekzekutoj (?) kaj perforta prezentado al la entreprenisto de l' fotografoj de l' laboristoj por spiona uzado. Aliaj postuloj estis: liberigo de arestitoj,

redungo de malprave maldungitaj laboristoj kaj puno al submastroj pro ofendo kontraŭ laboristoj.

Jen la rezultoj de l' strikoj: Plena malvenko de l' laboristoj — 39 strikoj; plena venko — 16; parta venko — 26; promesoj esplori la postulojn de l' strikantoj — 13; lokaŭtoj — 2.

Mi citu por pliampleksigo de la bildo el *"Semajna Akompananto"*, la ĉinia komunista revuo: —

Dum la unuaj 20 tagoj de junio 1926 en *Ŝanghai*, okazis 40 strikoj, partoprenitaj de ne malpli ol 30 000 laboristoj. Karakteriza trajto de ĉi-strikoj estas, ke



Ĉinoj manifestas

la plejmulto okazis inter hejm-laboristoj (kudr-juvelistoj, ktp.). La strikojn gvidis la Konsilantaro de Ŝanghai-aj Sindikatoj.

Multsignifa estis la striko en 7 silkoŝpinejoj. La laboristinoj strikantaj sukcesis atingi du-monatan forpermeson (kun salajro) antaŭ- kaj post nasktempo; tiu striko progresigis la strikmovadon inter ĉiuj laboristinoj.

La ĉefa postulo de la plejmulto de la juniaj strikoj estis: 12-hora labortago kun 1 horo por tagmanĝi.

Apud *Ŝanghai* en *Usji*, pro la instigo de *Ŝanghai*, samtempe strikis la Laboristaro ĉe 19 silkoŝpinejoj kaj 23 deponejoj — fakte ĝenerala striko. Okazis ankaŭ en *Hankaŭ* ĉe la angla-usona tabakfabriko kaj ĉe la silkoŝpinejoj en *Dajren* ĉesigo de laboro.

La graveco de la Konsilantaro de Ŝanghai-aj Sindikatoj treege kreskis dum ĉi-strikoj, rezulte, ke la *Ŝanghai-a* urbestraro estis devigata inviti la Konsilantar-reprezentantojn diskuti la rekomencon de laboro ĉe entreprenoj.

El *"Transbajkala Laboristo"* trad. *K. Fade.*

☆

Je la Nomo de l' Vivo

Filozofi-lirikaj Fragmentoj

Originala verko de nia K-do **E. Izgur**

Enkonduko de **E. Lanty**

Antaŭparolo de **N. Kruĉinin**

Prezidanto de Tutukraina Asocio de Proletaj Verkistoj kaj Prezidanto de Tutukraina "Proletkult"

224 paĝoj, 13,5×18 cm, abunde ilustrita.

—o—

De nun havebla ĉe nia Administracio: Colmstrasse 1, Leipzig O 27

—o—

Prezo: klasika eldono: bonega papero,
bela koverto . . . . . 2.— mk.
luksa eldono: . . . . . 2.50 mk.

Jubileo-Ĉeno[1]

132 (Lyon) 25 fr. fr. alvokas ĉ. SAT-anojn laŭpove donaci al SAT okaze de l' 40-a datreveno de esperanto. ĉ. SAT-anoj ankaŭ estu malavaraj por la kaso de la VII-a Kongreso. — *Celodonio kaj Corral* (Buenos-Aires) 1 pesos. — *SAT-grupo* (Odessa) 5,75 rubl. k. alvokas la grupojn Lyon kaj Kassel. — *Bleier* (Ujpest) 1,52 peng. — *Kröger* (Nordshausen) 0,50 mk. g. — *M. N. Ŝ.* (Sofia) 50 lev. invitas ĉiujn K-dojn en la sama urbo imiti tion. — *Sommer* (Selb) 1 mk. g.

Mi donacas unu ĉeneron *(1 rublon)* kaj aĉetas 1 akcion duondolaran. Jenajn Gek-dojn mi alvokas ekfari la samon kaj ili alvoku iliajn gekonatulojn: (Ivanovo-Voznesensko). — Lebedev, Stefan, Alaŭdina, Medvedeva, Smirnov I. S., Mizerovskij, Ŝibaev, Makarin, ĉiujn rondetgvidantojn, tekstrustan rondeton. (Göteborg). — Ambaŭ Adamson Einar kaj Elma, (Skotlando Glasgovo 20 Kelvinghaughstr.). — Thomas Crawford, sataniĝu! (Johannesburg). — Dambe D., A., S. 6223, 3958, 7362, (Usono Denver-Colo). — Weber M., 5934, (Hannover) bei Bödeker, Kriegerstr. 35, IV l. — Paul Schallmey, (Glauchau). — Erich Hofmann 6332, (Leipzig W 33, Klopstockstr. 10, II l.). — Ernst Thiele ne alvokas pro lia senlaboreco, (Elberfeld, FingscheidterStr. 19a). — Ervald Killmer, (Anglio, South-Shields 6 Harfer Str., County Durham). — Johano Douglas, sataniĝu! kaj ĉiujn aliajn gekorespondantojn! Se ili ĝisnune ne abonas "Sennaciulon" — abonu ĝin nepre! La adresojn kaj Satnumerojn de kelkuloj mi aldonis, por ke la Administracio de SAT plenumu ta proponon de J. Jurysta en n-o 117 pri abonigo por "S-ulo".

Gekamaradoj! Forĝadu la Jubilean Ĉenon! Ne prokrastu plenumi vian devon!

Satano 6319, N. Graĉov.

Nosko (Salsk) 1,50 rubl. — *S.* (Dresden) 2 mk. alvokas Hertel (Meissen). — *Zirjanov* (Kurgan) 1 rubl. alvokas Ŝubin k. Ĉukanov (Sverdlovsk), Vasiliev (Petropavlovsk) SAT-anojn PTT-oficistojn sovetiajn k. alilandajn k. siajn gekoresp-antojn. — *Schürrer* (Wien) 1 ŝil. — *Zankl* (Neunkirchen) 1 ŝil. — *Egers* (Kiev) 1 rubl. laŭ alvoko de Nicollet k. Löwe, alvokas siajn koresp-antojn. — *Viktorov-Ĉehoviĉ* (Kiev) 1 rubl. same alvokas kiel Egers. — *Gek-doj Yelland* (Konstantinopel) 3,60 mk. g. — *Piskunov* (Niĵni-Novgorod) 1 rubl. laŭ alvoko de Kalaŝnikov, invitas Gek-dojn Titov, Burov (Niĵni-Novgorod), Petelin, Dadulin, Zaĥariĉev, Ŝagurov, Popiŝev, Krilova (Niĵni-Novgorod, Miza Kontora Telefon), Wernicke (Leipzig), Ullmann (Essen). — Ni, SAT-anoj studentoj de Universitato en Kaunas: *J. Dagys* 3 lid., *V. Butkus* 3 lid., *4894* — 1,50 lid., *J. M. Dagys* 3 lid., *K. Snarskis* 2 lid. *A. Ŝpuoris*, estonta SAT-ano 2 lid., kaj alvokas SAT-anojn studentojn de Leningrada Universitato.

Kiel protesto kontraŭ la disputaĉo de kelkaj LEA-anoj kontraŭ SAT, decidis la *Herne-a LEA-membraro* donaci 5,— mk. g. por la Jubileo-Ĉeno. Samtempe la tuta LEA-grupo aniĝas kooperative kiel pasiva membro al SAT.


SAT-anoj (Poltorack) 4,60 rubl.; Gek-doj *Gratov* (Ĉerniŝevskaja) 1,50 rubl. invitas Pimenov (Murtazovskoe), Artemjev k. Smirnov (Nalĉik), k. Fröding (Rockford). La du lastajn vegetaranojn, ni petas sekvi la alvokon de K-do Brukson (S. 109). *Cerny* (Wien) 1 ŝil.; *Icha* (Wien) 1 ŝil.; *Smith* (London) 4/5 ŝil. *Deutschle* (Basel) 1 fr. svis., alvokas la svisajn Gek-dojn. *Champion* (Lyon) 5 fr. fr.; *Duran* (Baixas) 7 fr. fr.; *SAT-anoj* (Halle) 12 mk. g., alvokas la SAT-anojn de London k. Minsk. *Ge-Batta* (Wien) 5 ŝil., alvokas la Gek-dojn en Budapest k. Preŝov, kiuj vizitis niajn kursojn, same ĉ. hungariajn SAT-anojn, ke ankaŭ ili donacu, kiom ili povas por la Ĉeno. *Gütling* (Hamburg) 1,30 mk. g.; *Vincent* (Paris) 10 fr. fr.; *Bogdanov* (Velij) 1 rubl.; *Jadlovker* (Velij) 0,50 rubl. laŭ alvoko de K-do Bogdanov. — *Iuelie* 1 dolaron, alvokas R. Guinef, Khabarovsk Ulitsa K. Marks D. 28, kb. 10, Sovetio.

[1] Vidu la n-on 100 de "S-ulo".

Politiko de la episkoparo en Polio

La ĉi-tiea nacidemokrataro sentas sin malfortigita post la majaj okazintaĵoj kaj bezonas subtenon de popolamasoj. Alproksimiĝas balotoj; sen la klerikularo mankos voĉoj. Estiĝas ankaŭ timo, ke alia partio akiros favoron de la klerikularo.

Aliflanke parto el la episkoparo, kun la fama intriganto, armena episkopo



Teodoroviĉ, ankaŭ avidas povon kaj influegon. Post kelktempa intertraktado reakciul-episkopa ligo estas starigita.

Je katolika kunveno en Poznanj pastro Primato Hlond faris politikan paroladon kontraŭ la nuna registaro. Li pruvadis, ke en Polio "ne ĉio estas pola", ke Polio devas eltiri "kolon el framasona laĉo"; ke iu ŝtato (Italio) montras al polaj vojon por liberigi sin el framasona laĉo ktp.

Baldaŭ poste okazis en Varsovio kunveno de episkopoj. Poste estis dissendata komuniko, enhavanta decidojn de la kun-

veno. Ili estas kontraŭregistaraj. Ili riproĉis la registaron, ke "malaperas laŭleĝregeco", ke la registara gazetaro estas kontraŭkatolika; ke la registaro subtenas sektanojn ktp.

Ĉi komuniko ekmiregigis polan socion.

Evidente la episkoparo opiniis sin ia supera Tribunalo, staranta super Polio kaj juĝanta ĝian politikon.

Ĉe kunsido de sejma (parlamenta) kleriga komisio, deputito Ĉapinjski interpelaciis pri ĉi afero anstataŭanton de la ĉefministro, s-ron Bartel. Ĉi lasta deklaris, ke tuj post apero de la "komuniko", li turnis sin al papa nuncio kaj episkopo Kakovski, kiuj klarigis, ke la "komuniko" estas "falsa" (!) kaj ke baldaŭ aperos alia, favora al la registaro.

Jen kiel agas niaj pastroj. Ricevinte frapeton sur la nazon, ili moderiĝis. Sed ĉu por longe? Kredeble la "ligo" de la klerikularo kun la reakciularo plue daŭras. El "*Pobudka*" libere trad. (2798).



Ekonomia krizo en Francio

Ni jam citis ciferojn[1]), kiuj bone montras la regulan kreskadon de senlaboreco — jen aliaj seriozaj simptomoj: la importoj de krudaj materialoj konsiderinde malpliiĝas. Dum lasta septembro ili malpliiĝis, kompare la antaŭan monaton, de 191 095 tunoj. Dum oktobro nova malpliiĝo de 160 450 tunoj. Plie, la importoj dum oktobro 1926 sumis 1 083 907 tunojn malpli ol dum la sama monato de la antaŭa jaro. Ĉar temas pri krudaj materialoj, estas memkompreneble, ke la industrioj, kiuj prilaboras ilin, laboros malpli ol lastan jaron je la sama epoko.

Ni konsideru nun ŝpin- kaj teks-industriojn: La haveno Dunkerque, kiu ricevas la krudan lanon por la fabrikoj de norda Francio ricevis 10 000 pakegojn dum monato oktobro 1926 kontraŭ 67 000 dum oktobro 1925. La koncernaj ciferoj por novembro 1926 kaj 1925 estas 80 000 kaj 107 000.

Do ne povas esti dubo, krizo ekzistas; spite la registara optimismo, ĝi disvolviĝos. Kiajn rimedojn oni proponas? Unue oni parolas (sufiĉe malprecize) pri organizo de grandaj ŝtataj entreprenoj, kiuj dungus la senlaborulojn. Sed la plano ne estas preta kaj cetere ne sufiĉe taŭga. Alia-rimedo ŝajnas pli trafa, por niaj naciemuloj. En Francio estas nun ĉirkaŭe 2 500 000 eksterlandanoj, el kiuj 1 500 000 estas efektive laboristoj — jen do mirinda simpla solvo: oni forpelos la eksterlandanojn! Krom tio multaj kolonianoj, kiujn oni same povos forĵeti laŭbezone. Kaj oni devas konfesi, multaj francaj laboristoj opinias, ke tiu solvo estas justa. Certe, sennaciismo ankoraŭ ne regas la spiritojn! Spite la gvidvorto "egalrajto por ĉiuj laboristoj, ĉu francoj, ĉu eksterlandanoj", ni estu certaj, ke tiuj ĉi lastaj estos viktimoj de la krizo, kvankam Poincaré deklaris, ke ankaŭ eksterlandaj senlaboruloj ricevas monhelpon. La konsekvenco de ĉio tio estas, ke multaj firmoj malplibonigis la labortagon; aliaj tute fermis. La mastraro volas profiti je la okazo, por malpliigi la salajrojn. Tio oni jam spertis en kelkaj laborejoj. Ŝajnas, ke la sindikatoj ne estas sufiĉe fortaj, por trudi al la registaro la pagadon de sufiĉe alta monhelpo. Do certe pro tio la Laboristaro suferos. Sed la mastroj tute ne okupiĝas pri tio, ilia pli granda zorgo estas organiziĝi. Ĉe la lasta kongreso de la fandejestroj de norda kaj nord-orienta regiono de Francio oni decidis la jenon:

1. La mastroj dungos iun laboriston nur kiam li havas specialan pagbileton, kiu sciigos kiom li gajnis en sia lasta laborejo. 2. En okazo de striko, ĉiu membro de la mastra-sindikato promesos ne dungi strikantojn kaj maldungi tiujn, kiuj erare estus dungitaj.

Samtempe ili voĉdonis pri diversaj rimedoj por nuligi inter si la konkurencon.

Ni tuj rimarkigu, ke la unua punkto estas kontraŭleĝa, sed ĉu ekzistas leĝoj por niaj mastroj?

Resume: La laboro maloftiĝas, la salajroj ekmalpliiĝas kaj niaj mastroj organiziĝas.

Ĉu, paralele, la lab. sindikatoj fariĝas pli potencaj? Mi dubas. Mi legis artikolon, en kiu gvidanto de ruĝaj sindikatoj plendos pri nesufiĉa vigleco de la movado. Tian aserton mi ne legis pri la reformistaj sindikatoj. Sed estas certe, ke la tempo ne estas favora por la varbado. La laboristoj timas pri maldungo! Nuntempe oni povas krei senlaborul-asociojn, ekster kaj apud la sindikatoj. Eble tiel ia sukceso estos atingata.

Kamij Ru (835).



EL PORTUGALIO

Senlaboreco — Vivrimed-kareco

Kiam oni legas en *Sennaciulo* pri la ribelkrioj de SAT-anoj ĉiulandaj kontraŭ mizero kaj malbonaj kondiĉoj, oni povus pensi, ke, pro tio ke K-doj portugalaj nenion diras pri la stato de ĉi-tiu landeto de l' ekstremokcidenta Eŭropo, ili vivas en vera paradizo. Tamen, se ni volas pentri plej eble fidele la vivon de la Laboristaro ĉi-tie, ni devas fari bildojn tute similaj al tiuj faritaj de niaj alilandaj K-doj.

Senlaboreco

En ĉi-tiu lando ankaŭ laboristoj estas premataj de senlaboreco. La burĝ-socio tute ne sin okupas pri la bezonoj de la laboristoj, sed nur pri interesoj burĝaj. En socio bone organizita la produktado, disdonado kaj konsumado de vivrimedoj necesaj devus esti metode aranĝitaj profite al la kolektivo sed fakte la nuntempa produktado estas direktata nur laŭ individua intereso kaj de tio rezultas la paradoksoj, ke labormanko en teksindustrio estiĝas dum la plimulto el laboristoj sin vestas ĉifone, la funkciado de industrioj haltas nur pro tio, ke konsumantoj ne havas aĉet-povon por havigi al si kion ili bezonas.

En ĉi-tiu lando, konsiderata de la vantaj kaj stultaj patriotoj kiel plej riĉa kaj bela, kie oni ne povas trovi hospitalojn nek lernejojn, se oni konstruigus la domojn plej bezonatajn, certe ne estus 40 000 domkonstruistoj senlaboraj. En metalurgio la samo okazas kaj tio ankaŭ ne estas pro manko de farendaĵoj, ĉar la posedantoj sendas ŝipojn alilanden por riparado.

Estas videble, ke pro tia fuŝmastrumado, multaj laboristoj nur mizere vegetas.

La plimulto da laboristoj ĉi-landaj (75%) estas analfabetaj kaj laŭ ili ne estas alia rimedo, por forigi la mizeron ilin premanta, ol la elmigro al Brazilio kaj Usono[1]). Klasbatalas nur la industrilaboristoj kaj malgraŭ la klopodoj de organizoj laboristaj, la varbado al kamparanoj por niaj ideoj estas tre malfacila. La troa uzado de alkoholaĵoj ankaŭ stultigas multe da laboristoj kaj oni ĉagrene devas konstati, ke estas pli facile atingi, ke laborulo elspezu por ebriigi aron da kunuloj, ol por kotizi al sindikato.

Vivrimed-prezoj kompare salajrojn

SAT-anoj povas kompreni la ĝeneralan staton de portugaliaj sklavoj per la nombroj, kiujn mi sube aldonas:

Metio	*Salajro potage en eskudoj*
Helpantoj komercaj	11.00
Meblistoj	20.00
Kompostistoj	20.00
Masonistoj	18.00
Razistoj	17.00
Metallaboristoj	18.00
Domkonstruistoj	12.00

Manĝaĵoj	*Prezo en eskudoj*
Terpomoj, po kilogramo	1.00
Porkaĵo	8.00
Bovaĵo	9.00
Sukero	4.00
Aĉa pano	1.80
Pli bona pano	2.00
Gadfiŝo plej aĉa, manĝata de laboristoj	6.00
Olivoleo, po litro	10.00
Lakto	2.00
Petrolo	1.60
Ovoj, ĉiu	0.75
Sardinoj, dekduo	2.50

Estas notinde, ke laboruloj portugaliaj sin nutras preskaŭ nur per gado aŭ sardinoj rostitaj kaj terpomoj kun vinaĉo. Viandon povas aĉeti nur riĉuloj. La

[1]) Vidi n-on 122 de "S-ulo".

[1]) Laŭ statistiko, lastjare elmigris 42 000 laboristoj, sen mencio pri tiuj, kiuj elmigris kontraŭleĝe.

legantoj de *Sennaciulo* konstatos facile, ke la plej altaj salajroj ne sufiĉas por deçe subteni kvarmembran familion.

Loĝado

En grandaj urboj laboristoj loĝas laŭ plej maldecaj kondiĉoj: Ne malofte en kvinĉambra domo kunvivas tri familioj kun infanoj; ĉiu familio ofte devas elspezi 120 eskudojn, aŭ pli, monate por tiaj loĝejoj. *Porfirio da Silva* (8146).



Unu problemo por Italio

La ekonomia situacio de la itala popolo estas malfavora, kaŭze de la loĝantar-denseco. La situacio akriĝis tiom pli depost kiam Usono limigis la enmigradon. Por ĉiuj italaj registaroj la elmigrado estis kaj estas la plej grava enlanda problemo. Senescepte ĉiuj registaroj provadas ĝin solvi. Tiucele agis la estinta parlamenta burĝa demokratio kaj same la nuna faŝista reĝimo.

Historia neceso

Sub la iluzia celo Italion venigi je la nivelo de la "Roma Imperio" sur la Mediteranea maro, troviĝas nenio alia ol la kruda historia neceso: solvi la elmigradan problemon per ekspansio. Mussolini, donante al la popolo ĉi iluzion de la grandeco de la estinta Roma Imperio, havas la nuran celon esperigi kaj kredigi ilin en sia savo. Konante la kredemon, la specifan karakteron de la italoj, li elektis la plej ornamitan formon de la kredeblo kaj donis ĝin al la malsata popolo. Sed ni scias, ke iluzio havas finon kaj, se la promesoj ne estas efektivigeblaj, la amasoj fine ribelos kontraŭ la nun adorata gvidanto. Do, la historia neceso unue kaj la sinteno de la faŝista reĝimo due estas elementoj, kiuj puŝas Italion en aventurojn, kiuj nepre kondukas al milito.

La burĝa itala demokratio

La burĝa demokratio en Italio ne posedis tiun kuraĝon libere prediki kaj sin organizi por unu celo: solvi per ekspansio la priparolitan problemon, sed tute singardeme kaj timeme agadis en la diplomatia kampo. Necesas, ke mi iom klarigu pri ĉi afero.

Beograda ĵurnalo "Politika", antaŭ kelkaj tagoj, aperigis artikolon: "Italio kaj Bulgario" el la plumo de eksministro de la Stambolijski registaro, nuna bulgara elmigrinto, Kosta Todorov, kiu rakontas kiel itala diplomato, barono Alioti, en la jaro 1920, proponis al Stambolijski "sekretan ligon" kontraŭ Jugoslavio sub la motivo, ke la interesoj de Italio identiĝas kun tiuj de Bulgario. La propono estis rifuzata de Stambolijski, kiu celis unuigi Bulgarion kun Jugoslavio. Plurfoje antaŭ kaj post la Ĝenova Konferenco la itala diplomatio provis altrudi al Bulgario la celon de la "sekreta ligo"; pro nesukceso Italio ĉiurilate agis venĝe kontraŭ Bulgario ĉe la riparaj konferencoj. En la lastaj tagoj, faŝista Italio sukcesis penetri unuapaŝe la Balkanon. La trakto inter Italio kaj Albanio submetigis ĉi lastan sub la protektoraton de Italio, kiu estas ankaŭ allasata enmiksiĝi en internaj aferoj, se la nuna Ahmed-bey-zoga registaro troviĝos en danĝero rilate enlandan revolucion. Plue, Italio ambaŭmane laboras por izoligo de Jugoslavio kaj ties ĉirkaŭigo per malamikaj ŝtatetoj. En tio Italio sukcesis. Ĉio ĉi diplomatio celas depreni el Jugoslavio ĝian okcidentan parton, precipe Dalmacion, kaj ekposedi la tutan Adriatikan marbordon. Tio estas grava akiro por Italio, por altiri la tutan trafikon el la danubaj kaj orientaj landoj.

Danĝera politiko?

Jen la tendenco de Italio en la Balkano. Sed ĉu ne estas danĝere, tuŝi tiun vespujon, kiel faris la estinta ŝtato Aŭstro-Hungario... Kiu konas la historion de Balkano, scias, ke en si ĝi estas vulkana regiono. Imitante Aŭstro-Hungarion, la itala diplomatio povus enplektiĝi en la retaro, kiu produktas novan mondmiliton.

La kolonioj

Ni nin turnu al aliaj regionoj, kie Italio same serĉas la vojon por elmigrado. Ĝi posedas en Afriko nur tri koloniojn negravajn. Unu, Tripoli, estas tro sabloplena kaj nekulturigebla por taŭgi, sen granda elspezo. Ĝis Italio ne estos solvinta la koloniigan problemon, ĝi ne subtenos politikon pacifistan laŭ tutmonda skalo. Tial ni vidas, ke la historia neceso de la itala popolo devigas ekspansion, je konkurado al aliaj popoloj apud la Mediteranea maro kaj en Balkano; tiu neceso estas la kaŭzo de la malamika rilato kontraŭ Jugoslavio ankaŭ kiel kontraŭ Francio pro Tunisio kaj Sirio, kaj kontraŭ Turkio pro la Azia marbordo.

Ni pretiĝu

Nuboj jam vidiĝas sur la horizonto de Eŭropo; Italio kaj Francio grupigas trupojn ĉe la limoj... oni rakontetas, ke en Francio troviĝas Jugoslavaj taĉmentoj... la ministro de la komunikilaro de Jugoslavio post la konkludita pakto inter Italio kaj Albanio, fariĝis generalo...

Se ni bone juĝas la politikan evoluon depost la mondmilito ĝenerale, ni vidas, ke la situacio en Eŭropo prenas la direkton de nova sanga kolizio; la studo de la situacio avertas nin, ke prepariĝas nova hombuĉado. Ĉu la laboristoj konsentos denove militi por naciaj interesoj? Aŭ ĉu ili pretiĝu por la klasbatalo, unuiĝante super kaj malgraŭ la landlimoj?

EL AUSTRIO

La reakcio murdas[1])

Nunjare okazos balotoj por la landa parlamento en Aŭstrio. Pro tio la politikaj partioj, ĉiam pli kaj pli aktiviĝas; kunvenoj sekvas unuj post aliaj kaj ĉiuj partioj nature ŝatus venki. La demokrataj leĝoj de Aŭstrio al ĉiuj partioj la plej grandan liberecon permesas. Ĉi liberecon pleje eluzas la reakciaj partioj. Dum iliaj kunvenoj ĉiam pli kaj pli kuraĝaj, entuziasmigaj paroloj aŭdiĝas.

La plej forta partio en Aŭstrio estas la soc.-dem. partio, kiu ankoraŭ kelkajn centmil voĉojn bezonas por havi la plimulton en la parlamento. Pro tio la reakciuloj tre vigle agadas precipe en tiuj partoj de la lando, kie la Laboristaro ankoraŭ ne estas tute organizita. Tia landparto estas Burgenland, kiu antaŭe apartenis al Hungario.

La 30-an de januaro la soc.-dem. partio en vilaĝo Schattendorf, kiu estas en la supre citita landparto, ĝeneralan kunvenon aranĝis; ĉio bone sukcesis, nur kiam la amaso jam komencis disiri, tiam el la restoracio Tscharmann pafado trafis la preterirantojn. La pafado mortigis M. Smaric, militinvalidon, kaj J. Grötsing, 8-jaran knabeton, kaj 15 aliaj homoj vundiĝis. Kiel oni poste eksciis la pafadon faris la tiel nomataj "nigraj (reakciaj) frontbatalantoj", kiuj post siaj fiagoj trankvile transiris en la proksiman Hungarion, kie ili en sendanĝera loko estas ĉe la ĉefmurdisto Horthy.

Informite pri la afero la Aŭstria Laboristaro tre ekscitiĝis kaj eĉ en kelkaj fabrikoj strikon komencis. La 31-an vespere antaŭ la Wiena urbdomo okazis grandega manifestacio, kiun partoprenis ĉirkaŭe 40—50 000 laboristoj.

Jen kiel statas la politiko en Aŭstrio: ĝis nun proksimume 10 homojn murdis per la sama maniero la reakciularo.

Aŭstria Labesko.

*

Kremacia Asocio

La laborista kremacia asocio nomita "La flamo" en Wieno la 11-an de decembro en 1926 eldonis sian okdek-milan (80 000-an) membro-libreton. La asocio fondiĝis en la jaro 1904. En 1920, ĝi havis nur 1210 membrojn. Sed post la malfermo de la Wiena krematorio[2]), kio okazis dum la aŭtuno de la jaro 1922, ĝia membraro fortege kreskis. En 1923 ĝi jam havis 12 637 membrojn, kaj en 1924 31 823; en 1925 ĝi havis 50 238 asocianojn, kaj dum la pasinta jaro (1926) aliĝis ankoraŭ 30 000 gelaboristoj. Ĉi societo evoluas plej bone, malgraŭ ĉiuj klerikalaj penadoj kontraŭ ĝi.

El "*La vespero*" tradukis (SAT-ano 6967).
Aŭstria Labesko.

---

[1]) Fimortigas, buĉas. — *Red.*
[2]) Kadavrobruligejo. — *Red.*



EL HUNGARIO

K-do Ŝtefano Németh mortis en hungaria malliberejo

Li estis arestata sekve de proceso kontraŭkomunista: Rákosi-Vági kaj kondamnita post 10-monata esploradkapti-teco je *22*-monata malliberigo.

Lia advoko jam antaŭ tribunalo petis la prezidanton liberigi nian pulmomalsanan K-don, el kies vivo ĉiu tago en arestejo jarojn forprenas. Sed klasa juĝistaro estas senkompata. Tiel Ŝtefano Németh — kiu ne falsigis "frankojn", ne ŝtelis trompe miliardojn, mortigis nek en Orgovany, nek en Kelenföld (kie post falo de 1919-jara proletdiktaturo, multaj laboristoj estis kruele mortigitaj), — sed kuraĝis nur aŭskultadi komunistajn paroladojn, — preskaŭ agonianta trafis t. n. kolektmalliberejon.

Nia partigvidantaro (H.S.L.P.) ĉion faris por lia ekliberigo el arestejo, irigis senditaron al ministro-prezidantaro, sendis memorilojn al justecministro, sendis unu post alia la advokatojn al diversaj magistratoj kun kuracistatestiloj kaj ni ĉiuokaze citis, ke monfalsigintoj kondamnitaj je *2* jaroj, duelmortigintoj priјuĝitaj je 4 jaroj troviĝas liberaj, — kaj nun Ŝtefano Németh, volinta nur lerni, — mortiĝas en arestejo.

Windischgratz, la degenerinta princa monfalsiginto, kiu havas nur solan virton, ke lia plano malsukcesis, estas transmetita en sanigejon, malgraŭ 4-jara, valida juĝo je plej severa pundomo — K-do Németh, por kiu restis ankoraŭ nur 7 monatoj da nevalida, nur unugrada puno — estas nun mortigita!!

Simile al hundoj estas traktataj la laboruloj de l' perfortaj organizoj de l' ŝtatpotenco; eĉ ĝi ne sciigis la konatojn de la mortinta K-do, ke li ne plu vivas, kaj tiel okazis, ke du fratoj liaj, la lastpasintan dimanĉon, ekiris al la malliberejo por viziti lin kaj, kiam ili petis la necesan permeson, la kuratoro respondis: "Németh? . . . Ŝtefano Németh? . . . Hm . . . hm., hm . . . hm! T i a troviĝas en la kadavrodomo"!

Laboristoj! Socialistoj! Eĉ momente ne forgesu, kiujn la burĝa klasjuĝistaro priјuĝas p l i p e z e, ol mortigintojn. Eĉ por minuto ne forlasu la batalon, kiu estonte foje venĝos la morton de K-do Ŝtefano Németh, kiel tiun de K-do Ladislao Erdös (post lia senkulpiga eklibe-riĝo el 70-taga aresto). Ni ne forgesu, ke la ŝtataparato de kontraŭrevolucio denove mortigis senarmilan, senrajtigitan proleton . . . *(SAT-ano 7579.)*

Se vi deziras profundiĝi en la materion de "Sennaciismo", vi nepre aĉetu kaj legu la 2-an eldonon de

A. B. C.
de Sennaciismo

Mendebla ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

EL BRITIO

Daŭro de Labortago

Tre gravas por la Laboristaro la daŭro de la labortago. Pri ĝi okazis multaj obstinaj bataloj kaj en Brito en la fabrikoj kaj minejoj la labortago limiĝis per leĝo. En nova akto diskutota en la Parlamentejo proponiĝas malantaŭema paŝo. Ĝis nun tempo ekstra je la laŭleĝa labortago limiĝis maksimume je 50 horoj dum unu jaro. Nova maksimumo estos 150 por inoj. Junuloj, kiuj antaŭe ne rajtis labori dum ekstra tempo, nun povos tiel labori ĝis 100 horoj po ĉiu jaro, kiam ili estas 14—16-jaraj kaj ĝis 150 horoj, kiam ili fariĝis 16-jaraj. La nuna registaro ricevas ĉiaman famaĉon ĉar nur ĝi plilongigas la labortagon notinde por la karbministoj kaj ankaŭ por la junuloj. Jen statistiko pri la antaŭa progreso.

Jaro	*Limigo*
1833	9 horoj por infanoj 9—13-jaraj
1833	12 horoj por infanoj 13—18-jaraj
1844	12 horoj por virinoj
1847	10 horoj por ĉiuj fabrikejanoj
1888	8 horoj por gasfabrikistoj
1908	8 horoj por karbministoj
1915	8 horoj por fervojistoj
1919	7 horoj por karbministoj

(488)

La nunaj laborkondiĉoj de Britiaj Karbministoj

Jen la ministoj ree produktas la "nigrajn diamantojn" por siaj ĝismortaj malamikoj, la minejposedantoj. Depost la Granda Striko elmontriĝis plene la fitriumfemo de la mastroj, tre nude, tre kruele. La dumstrike agitintaj ministoj estas bojkotataj grandnombre; oni dekalkulas la luŝuldojn senkompate de la salajroj de tiuj, kiuj loĝas en domoj apartenantaj al la minkompanioj. Ankaŭ jam okazis diversloke malaltigo de salajro tute kontraŭe al la interkonsentoj faritaj inter la minejestroj kaj la ministoj mem. En la minejo oni nin traktas kiel brutojn. Se ni enŝovelas akcidente ŝtonaĵon kune kun la karbo, do senkulpigoj kaj klarigoj tute senutilas, kaj oni tuj aŭ eksigas aŭ monpunas nin.

Tamen, la plej grava atako estas farata kontraŭ la ministaj lokaj sindikatoj. Tiucele la minejestroj estas helpataj de perfidemaj sindikatoficuloj mem, kiuj fervore penas elpeli el la sindikatoj la agitemulojn. Sed la rezultoj de la striko tiom pravigis la avertojn de la revoluciemaj elementoj, ke jam komencis la ministoj ŝanĝi la estrecon de la sindikatoj, anstataŭigante la perfidulojn. Tiel okazis en mia vilaĝo. Pro tio la minejmastrumanto tiel koleris, ke li minacis formovi la kotizbudon el la mineja korto, kie ĝi staras kutime en Britio. Kvankam la sindikato restis ĝisnun malbone organizita, pro la senaktiveco de la oficuloj nun eksigitaj, tamen la ministoj tie ĉi intencas kontraŭstari la minejmastrumanton kaj devigi lin akcepti la novan komitaton.

Similaj kondiĉoj troviĝas sur la tuta britia karbareo. Sed kvankam oni dume nin venkis, oni nin ne disrompis. Ni vivas por batali denove. *W. Henthorne* (7382)

Tago el mia vivo

Mi pensis, ke serio da artikoloj sub la ĉi supra titolo, por la granda plimulto el la legantaro de *Sennaciulo,* estus tre interesa. Eble pri tio ĉi mi malpravas, ĉar mi prijuĝas la aferon nur laŭ miaj propraj deziroj. Tamen mi verkas la jenan artikolon, ĉar ĝi indikas tion, kion mem mi ŝatus scii pri la vivo de miaj K-doj SAT-anoj en diversaj partoj de la tutmondo. Ne ĉiu K-do vigle partoprenas la agadon de politika partio sialanda, ne ĉiu K-do spertas rilate al la ciferoj, nek sufiĉe scipovas por kompreni la statistikojn. Eĉ se li komprenas ĉi lastajn, nuntempe ili pritraktas aferojn plejparte ne sub lia kontrolo. Ĉu multe utilas, ke K-do el iu lando malproksima scias, kiom kostas ŝuparo en alia? Ĉu ne estus pli interese, sciiĝi kiel alilanda K-do kutime pasigas sian tagon, koni lian vivadon hejme? Ĉu, sciante tion, oni ne havus



pli intiman interrilaton kun la K-daro, ĉu oni ne sentus kreskon de spirito pli frateca, solidareca? Mi opinias, ke jes, kaj tial mi flankenlasas la ciferojn kaj donas al tiu ĉi artikolo tre personecan karakteron.

*

Mi havas 29 jarojn kaj estas helpinstruisto en ŝtata elementa lernejo en urbo Bournemouth, Anglio. Mi edziĝis antaŭ preskaŭ kvin jaroj, kaj nun havas du filetojn, 3- kaj 1-jarajn. Ni kvar loĝadas sur la unua etaĝo de bona domo, kiu frontas larĝan straton laŭlonge plantitan per pinoj. La ĉefstrato, kun tramreloj kaj butikoj, estas tre apude. Estas en la etaĝo unu manĝoĉambro, du dormoĉambroj, mia studoĉambro, kuirejo, postkuirejo, banĉambro kaj necesejo. La ĉambroj estas sufiĉe grandaj kaj altaj, kaj disponigas al la infanoj bonan spacon por ludi dum la pluvaj tagoj.

Nuntempe ĉiun matenon mi ellitiĝas inter la 7-a horo kaj 7.30. Mi min parte vestas, kaj iras en la manĝoĉambron por prepari kaj bruligi la fajraĵon. Fininte tion mi boligas kaldronon da akvo, kaj malsupreniras la ŝtuparon por suprenporti kruĉon da lakto. Dume, la edzino ellitiĝas, sin vestas, prizorgas la infanojn kaj preparas la matenmanĝon. Mi min razas kaj lavas, kaj finas la vestadon. Ni matenmanĝas. Poste la edzino lavas la pli junan fileton en bankuvo antaŭ la fajro, kaj mi pretigas min ekiri al la lernejo.

Mi ekiras al la lernejo, malproksima al

mia hejmo eble *2* kilometrojn, je la 8.40 h., bicikle.

La lernejo estas malnova konstruo, el brikoj, kun ardeza tegmento. Ĉe unu flanko estas enirejo al pavimita korto, tute ĉirkaŭata per aliaj konstruoj. Estas du vestibloj kaj kvar lernoĉambroj. Du ĉambroj estas grandaj. Ĉiu dividiĝas per tirkurteno, kaj en ĉiu parto de la ĉambro lernas klaso kun 30—40 knaboj. Mi devas instrui tiel flanke de alia instruisto. Nur knaboj, proksimume 250, ĉeestas la lernejon, kaj estas entute 8 geinstruistoj, 6 viroj kaj *2* virinoj. Aliflanke de la korto estas kvina lernoĉambro, tute el sulkigita fero. En ĝi estas tre malvarme vintre, kaj varmege somere.

Malantaŭ la lernejo estas du apartaj konstruoj, unu por knabinoj, kaj alia por geinfanetoj.

Alveninte ĉe la lernejon, mi lasas la biciklon en vestiblo kaj iras al mia klasĉambro.

Mi eliras en la korton kaj fajfas per fajfilo. La knaboj haltas, ĉesas kriegi, ludi, ktp. Denove mi fajfas, kaj ili marŝas al difinitaj lokoj. Unu post la alia la klasoj enmarŝas la lernejon, kantas himnon, rediras preĝon, kaj aŭskultas eble anoncojn.

La laboro komenciĝas je la 9-a. Ĝis la 9.40 mi *devas* doni t. n. "religian instruon". Poste, ĝis la 10-a, la knaboj lernas parkere strofojn de poemo antaŭe pritraktita. Sekvas, de la 10 h. ĝis 10.45 ĉiumatene, aritmetika leciono. Nun okazas paŭzo ĝis la 11 h.; la lernantaro eliras sur la korton por ludi, kaj mi ankaŭ eliras por kontroli kaj prizorgi ilin. Ne estas sufiĉe da spaco, la pli malgrandaj eble vundiĝos; iu, kurante, eble falos sur la ŝtonojn; ĉiuokaze, mi respondecas pri ili.

Je la 11 h. la knaboj denove enmarŝas la lernejon. Mi instruas pri la geografio de Eŭropo dum duonhoro; tiam okazas leciono pri literaturo, ĝis fine, tagmezo.

Post kantado de benpreĝeto la lernantoj kaj mi foriras hejmen por tagmanĝi. Por tio oni allasas du horojn.

Alveninte ĉe min, mia kutima demando estas, "Ĉu da leteroj?", ĉar la leterportisto plej ofte ne liveras ilin ĝis post mia matena foriro.

Ni tagmanĝas. La pli aĝa fileto sidas genue sur seĝo inter la patrino kaj mi, kaj la pli juna ligiĝas en alta infanseĝo aliflanke de la patrino, krietante por ricevi nutraĵon, kaj eligante sian tutan vorttrezoron pro mia honoro.

Post la manĝado la edzino foriras en la kuirejon por lavi la pladojn, dum mi prizorgas la infanojn, kiuj ludas inter si. Sed mi devas atenti, ke la pli juna ne surgrimpu seĝon aŭ sofon. Li bone povas tion fari, sed li ne kapablas mem sendifekte desuriĝi.

La edzino revenas, kaj lasinte la infanojn en ŝia prizorgo, mi iras en budeton en la ĝardeno por suprenporti karbon kaj lignaĵon. Mi purigas min kaj reiras al la lernejo.

Nun, je la dua, komenciĝas la posttagmeza laboro. Same kiel matene, la knaboj enmarŝas kaj mi vokas la nomojn kaj enregistras la ĉeestantojn. Dum tuta horo la leciono estas pri manlaboro. Mi dividas la klasanojn en du grupojn; unu ĉe la fundo de la ĉambro faras aritmetikajn problemojn; la alian mi instruas pri elementa librobindado. Sekvontan tagon, la du partioj intersanĝos la taskojn. Sekvas la ludtempo, kiu daŭras kvaronhoron. Alia instruisto deĵoras en la korto.

Reenirinte la lernejon, la knaboj kutime legadas al si dum 30 minutoj, dum mi aŭ korektas la aritmetikajn kajerojn aŭ elektas du partiojn por piedpilkludo. Unufoje po semajno ni marŝas je la 3.45 h. al publika parko por partopreni t. n. "organizitajn ludojn". Plejofte, vintre, la ludo estas futbalo.

En la parko estas kelkaj piedpilkaj ludkampoj, sed al ni ne estas permesate ludi sur ili, esceptinte nur se okazas konkuro inter la partioj de du malsamaj lernejoj. Ni ludas sur senutila terpeco flanke de la strato, kiu traas la parkon. La grundo estas neniel preparita, krom per starigo de celstangoj. Je la 4.30 h. mi ĉesigas la ludadon kaj ni ĉiuj hejmeniras por temanĝi. La lerneja tago finiĝis.



Post la temanĝo mi kutime ĉiun vesperon partoprenas la ludadon de mia pli aĝa fileto, dum la alia ĉirkaŭpaŝetas sub la zorgado de la patrino.

Johano (tiu estas la nomo de la pli aĝa); kaj mi preparas la relojn por malgranda vagonaro; li ordonas, mi obeas! La vagonaro fabrikiĝis en Bavario, kaj depost pasinta oktobro kaj ankoraŭ nun ĝi tre bone funkcias. Li ankaŭ havas modelan aeroplanon fabrikitan en Germanio, kiu aŭtomate renversiĝas kaj transiras la plankon. Ambaŭ fratetoj tre interesiĝas pri ĝi.

Dum la ludado, mi provas respondi la mil kaj unu demandojn, kiujn li faras. Ĉiam mi donas verajn respondojn, kvankam, kompreneble, simplajn, nekompletajn. Mi ne volas, ke li iam estu devigata mallerni ion, nek ke li perdu la fidon al mi. Mi respondas kaj simple klarigas ĉiam ĝis li kontentiĝas kaj facilanime pluiras al aliaj aferoj.

Se ni antaŭe jam interkonsentis pri la enlitiĝa horo, (ni tion faras fingromontrante al la horloĝa montrilo), li volonte forlasas la ludadon, kaj mi senvestigas kaj enlitigas lin. La patrino same faras al la alia fileto (kiu nomiĝas Brian), kaj kutime ambaŭ estas en siaj litetoj je la 6.45 h.

Tuj mi eliras la domon kaj veturas pertrame al apuda urbeto por instrui ĉe esperanta kurso por plenaĝuloj. La veturado bezonas duonhoron.

En mia regiono la esperanta movado estas ankoraŭ malforta. Por starigi bonan kurson ni decidis enlasi aliajn krom laboristoj-socialistoj. La utopiajn kreduloj ni pagigis, la laboristojn ni instruas senpage. Nu, tiu ĉi kurso en urbeto Christchurch (Krajstĉerĉ) malfermiĝis kun dek-ses gelernantoj, el kiuj kvin pagis kotizon. Nun, post proksimume dek lecionoj nur sep regule ĉeestas, kvar pagintoj kaj tri gelaboristoj. Ĉu estas pli konsilinde ankaŭ pagigi laboristojn? Kvinjara sperto montris, ke kiam oni senpage instruas esperanton multaj ne daŭre ĉeestas. Tamen, tri laboristtendencaj gelernantoj aniĝis ĉi jaron al SAT.

Ĉu alilande oni pagigas laborist-lernantojn?

Je la 9-a vespere la kurso fermiĝas, kaj mi revenas hejmen.

Aliajn vesperojn, mi vizitas SAT-grupon aŭ restas ĉe mi legante, preparante antaŭe morgaŭajn lecionojn, korektante kajerojn de lernantoj, ktp.

La edzino donas al mi trinki, ni sidas antaŭ la fajro interparolante, kaj je la 11 h. vespere, enlitiĝas, post kiam mi metis ekster la pordon kruĉon por la lakto matene. *H. Stay, SAT-ano 2978.*

☆ DISKUTEJO ☆

La antiidealisma sofismo de K. Marks

Daŭrigo

Kaj de tiu triobla naturo de l' homo, devenas, en la konduto de l' homa aktiveco, tri ordoj da instigiloj: egoistaj instigiloj, altruistaj instigiloj, nepersonaj aŭ ideologiaj instigiloj.

Ĉu puraj ideoj? Ĉu pura racio? Ne: ni lasas tian vidpunkton al la metafizikistoj! Sed *cerba dinamiko.* "Depost la sciencoplenaj studoj de Sinjoroj Fouillée (Fuje) kaj Tardes (Tard), ne estas permeseble nescii, ke la ideoj estas fortoj, kaj la bildoj, sugestoj kvazaŭ hipnotaj[1])".

Malgraŭ la diroj de Marks, ni povas konstati tiun vivon kaj sendependan aktivecon de la ideoj, unue sur la ekonomia kampo: en tiuj ekonomiaj interrilatoj, pri kiuj Marks asertas, ke ili estas *sendependaj de l' volo de l' homoj.*

"Ekonomia fenomeno, diras tre prave G. de Greef, ne estas fenomeno pure materia[2]).

[1]) Ch. Recolin, "Solidaires", pĝ. 159.
[2]) G. de Greef, "La Sociologie économique".

VORTARO DE ESPERANTO

de KABE (Dro K. BEIN)

Ĉi tiu internacia vortaro, verkita plene en esperanto, enhavas ĉiujn vortojn de nia lingvo (radikajn kaj devenigitajn), ĝenerale uzatajn de l' esperantistoj, kun esperanta difino de ilia rekta senco kaj iliaj ĉefaj figuraj signifoj. Ĉiu vorto estas difinita kun granda precizeco kaj mirinda klareco. Multaj frazmodeloj por klarigi la sencon de la vortoj kaj igi ilin memoreblaj, faras la verkon alloganta kaj vivanta.

Unu luksa volumo in-8, bindita, 175 pĝ.

Prezo: 2.20 mk. g. inkluz. sendkostojn.

ADMINISTRACIO DE SAT.

Kaj li precizigas: "La ekonomiaj fenomenoj, kiujn mi konsideras, konsente kun la Marksa skolo, kiel fundamentajn fenomenojn de la strukturo de l' kolektiva vivo, *entenas ideologiajn elementojn*[1])". Kaj aldone li denove precizigas: "Kiam iu fenomeno estas *socia, ĝi neniam* estas pure materia".

Tute vere. Tio estas tiel vera, ke Espinas povis diri, en sia admirinda libro pri "La bestaj societoj", ke socio estas *"organismo el ideoj"*, kaj ke Elisée Reclus (Elize Reklu), en *Evolucio kaj Revolucio,* povis ankaŭ prave skribi: "Estas la suko, kiu faras la arbon; estas la ideoj, kiuj faras la sociojn. *Neniu historia fakto* estas pli bone konstatita".

Nu, kion valoras de nun la aserto de K. Marks, kiu neas, en la produktaj interrilatoj, la rolon de l' volo? Ĉu ne estas vere, ke unu fojon pli oni konfuzis fatalismon kaj determinismon? Fatalismo, tio signifas simplistan (mankhavan) koncepton pri la kaŭzeco. Determinismo: tio estas neo pri la absolutismo kaj la kaprico en la naturo, koncepto malsimpla, koncepto sinteza, pri la etiologio[2]) de la fenomenoj.

La ekonomia simplismo, la *materialisma* simplismo de Marks estas tiom erara, tiom absurda ol la simplismo de la puraj (nuraj) idealistoj. Neante la kaŭzecon de l' konscio kaj de l' volo, li ne sufiĉe ŝatas tiun elementan biologian veron, ke la homo, vivulo, ne estas pasiva, ke li kapablas agi, movi proprarimede kaj iniciati; li ne sufiĉe ŝatas ĉi psikologian veron, ke ĉia konscia ago estas ia fenomenaro en kiu partoprenas, kiel fonto, kiel efika forto, la persona forto, la psika forto; li fine ne sufiĉe ŝatas la sociologian veron, ke la socia vivo kuŝas sur la kolektiva psikologio, ke ĝi eldevenas kvazaŭ floro el sia stango.

Male, konsenti same, kiel la simpla saĝo, pri la partopreno, kiom ajn malgranda ĝi estas, de la ideiĝo[3]) de la persona penso en la formado de la homaj aranĝoj, tio estas nei la fatalecon de la ekonomiaj fenomenoj, tio estas detrui ĉebaze la anti-idealisman sofismon de Marks, tio estas redoni al la racia, rezonanta volo de l' homo ĝian indecon kaj rajtojn.

Nu, bone, oni diros. La nura *materialismo,* la pura materialismo estas eraro. Sed samo estas rilate ekonomiismo. Certe, la ideoj havas relativan sendependecon kaj aŭtonomian rolon en la okazigo de la ekonomiaj fenomenoj; sed post kiam ĉi lastaj okazis, la ceteraj sociaj fenomenoj, la ceteraj kolektivaj fenomenoj estas nur ties fatala pliaĵo, aŭtomata konsekvenco. De la produktmaniero de la materia vivo rezultas la socia, politika kaj intelekta evoluo de l' vivo. "La efikaj kaŭzoj de tia aŭ alia metamorfozo aŭ socia revolucio ne devas esti serĉataj en la cerbo de l' homoj —, *sed en la metamorfozoj de la produktado kaj interŝanĝado*".

Tiel la problemo alilokiĝas, sed ĝi restas la sama. Temas scii ĉu la propra movado de la ideoj limigas siajn efikojn je la "ekonomia strukturo de l' socio" kaj sekve, ĉu la cetero, la tuta socia, politika kaj intelekta evoluo de l' vivo, estas nur "mensa kopio" de la ekonomia realo, ia vidiluzio kovranta tiun realon, ĉu la relativa sendependeco de l' penso kaj de l' ago ne daŭras en ĉiuj kampoj de l' vivo. Ĉu ĉiuj ideoj de la homo estas nur, post ĝisfina analizo, "profitemaj" ideoj, kaj tiam, post malakcepto de l' materialisma fatalismo, ĉu ni devas akcepti la ekonomian fatalismon? Tio estas la problemo, kiun trudas al nia esploro, ne la *materialisma* klarigo, sed la *ekonomia* klarigo pri la historio.

"Estas danĝera, diris Pascal (Paskal), tro montri al la homo, ke li similas la bestojn, nemontrante ankaŭ lian noblecon. Estas ankoraŭ pli danĝera, montri al li lian noblecon, ne montrante lian malnoblecon. Estas ankoraŭ pli danĝera, lasi lin nescii pri ambaŭ. Sed estas tre profita montri al li ambaŭ ecojn."

Ĉu oni ne similigas homon al besto, se oni kredas, ke li ne kapablas sendependigi sian penson je siaj materiaj interesoj kaj je tiuj de sia grupo? Ĉu oni ne forpenas lian noblecon — lian naturan noblecon, denaskan, fiziologian noblecon — se oni rifuzas al li la kapablon havi abstraktajn ideojn, superajn ideojn, el kiuj konsistas la indeco de lia speco, aŭ se oni rigardas tiujn ideojn kiel vanajn iluziojn?

Jes, la homo estas besto kaj pro tio estas devigata obei al ĉiuj fiziologiaj postuloj, al ĉiuj bezonoj de la besta vivo, sed li estas ankaŭ pensanta besto, konscienc- kaj racihava, kapabla koncepti kaj voli tion, kio estas *justa,* en ĉiuj kampoj, en la plena signifo de l' termino. Havi idealon — abstraktan ideon, sintezan ideon — ĝustan kaj justan, jen kio faras la homajn noblecon kaj superecon.

Multe da homoj, ho ve! ne havas homecon; ili estas nur homsimiluloj, perfektiĝintaj simioj; ili interesiĝas pri abstraktaj ideoj, nur se tiaj ideoj povas doni al ili profiton. Sed tiuj ne sufiĉe evoluintaj personoj, tiuj estuloj spirite ne maturaj, ĉe kiuj dormas ankoraŭ la homaj poveblecoj, estas nur homaj larvoj kaj ne ili faras la homan historion.

Kiuj faras tiun historion, sur ĉiuj kampoj, kiuj kreas la estonton, tiuj estas animataj de ideo, de abstrakta ideo, de ideo des pli potenca, ju pli ĝi estas sinteza kaj justa. La ideo, malgraŭ la diroj de l' marksanoj, regas la mondon.

Abstrakta ideo; sed ne metafizika ento[1]), ne fantazia elpensaĵo, sen ligo kun la realo: viva ideo, ideo-forto dependanta de la universala fiziko kaj obeanta ties leĝojn. Kia ajn estas ĝia moviga potenco, ideo ne havas ian supernaturan privilegion. Estante fizika realo, ĝi ne liberiĝos, kiel ajn alta kaj justa ĝi estas, for de la premo de l' medio kaj ne temas — oni ne miskomprenu! — iri de iu simplismo al alia kaj anstataŭi per idealisma absolutismo la materialisman absolutismon, kies vantecon ni konstatis.

(Pluo sekvos).

---

1) Id. pĝ. 138.

2) Esploro pri la kaŭzoj, scio de la kaŭzoj.

3) Necesas ĉi tie bone kompreni, ke ideo kaj penso ne estas tute samsignifaj vortoj. *Trad.*

1) Tuto de la ecoj kiuj konsistigas la esencon de estulo.

Por nia distro

Okazo kun Leo Tolstoj

Iufoje, kiam vagonaro estis alveninta la stacidomon, iu sinjorino deziranta revenigi sian edzon, kiu iris por trovi ŝarĝiston, komencis voki lin: "Grigori! Grigori!" Sed Grigori malaperis.

Tiam la ĉagrenita virino, ne sciante kion fari, kriis al unu modeste vestita homo: "Kuru rapide kaj voku mian edzon, vi ricevos moneron."

La maljunulo volonte kuris, plenumis la peton de la sinjorino kaj ricevis la promesitajn 5 kopekojn. Post kelka tempo ĉie oni flustris: "Tolstoj, Tolstoj..."

— Kie estas Tolstoj? demandis la sinjorino. Oni montris al ŝi la maljunulon, al kiu ŝi donis 5 kopekojn.

Momente ŝi proksimiĝis al Tolstoj kaj ekmurmuris: "Pro Dio! Pardonu, grafo, pardonu min", kaj hontigite ŝi petis lin redoni la 5 kopekojn.

— Ne, ne — respondis ĝoje Tolstoj. — Mi ne redonos la monon, ĝin mi perlaboris... Elrusigis *A. Liljer, Moskvo.*

PETRO

2-a reviziita eldono

Kursa lernolibro por laboristoj laŭ parola metodo

64 paĝoj kun ilustraĵoj

Por ĉiu simpla laboristo estas facilkompreneble priskribita per 30 mallongaj ĉapitroj la vivo de laboristo, komencante de lia infaneco kaj kondukante trans ĉiujn malfacilaĵojn de laborplenaj vivjaroj ĝis lia morto.

Prezo: 0,70 mk. g.

*

Tre rekomendinde estas, uzi en kursoj la

Laborkajeron al PETRO

Speciale kaj unike aranĝita kun vorttabeloj, ĝi eĉ ebligas kun vortareto lerni esperanton sen instruanto.

Prezo: 0,30 mk. g.

Ĉe aĉeto de pli ol 10 ekz. ni donas 30% rabaton!

Mendebla ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27. Poŝtĉeka konto 6835.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

ATENTU! GRAVEGE!

Rilatas al peresperanta gazetservado

Ŝajnas, ke la K-doj en diversaj landoj ne sufiĉe atentis la alvokon pri peresperanta gazetservado aperintan en n-ro 113 de *Sennaciulo*. Ni petas, refoje kaj profunde studi tiun alvokon kaj tiri poste la konsekvencojn, subtenante niajn klopodojn.

Ĝis nun anoncis sin ĉe ni kiel reprezentantojn de nia "Esperanto-Servo" K-doj el jenaj lingvo-regionoj: Alĝerio (Alger), Anglio (London), Belgio (Bruxelles), Finnlando (Helsinki), Francio (La Rochelle), Germanio (Leipzig), Hispanio (Sabadell), H... (blanka lando), Jugoslavio (....), Latvio (....), Nederlando (Aalsmeer), Norvegio (Oslo), Polio (....), Sovetio (petu informojn de ni, ĉar en organizado), Svedio (Göteborg), Svisio (Rolle kaj Basel). Belgio kaj la franclingva regiono de Svisio ricevas la gazetservan materialon tradukitan en franca lingvo per la reprezentanto en Francio; la germanlingvaj regionoj de Svisio kaj Ĉekoslovakio ricevas la materialon tradukitan en germana lingvo per la reprezentanto de nia "Esperanto-Servo" en Germanio.

Sed kie restas la respondoj de la laboristaj esp-istoj el Aŭstrio, Ĉekoslovakio (ĉeklingva regiono), Danio, Estonio, Portugalio, Afriko (diversaj landpartoj), Argentino, Brazilio, Kanado, Usono, Aŭstralio, Nov-Zelando, Persio, Ĉinio, Japanio, Turkio ktp.?

Al ĉiuj cititaj landoj ni sendis nian materialon depost komenco de ĉi jaro. Ja nia "Esperanto-Servo" eklaboris. Jam ni trifoje dissendis materialon. Ni intencas sendi la 1-an kaj la 15-an de ĉiu monato.

*

K-doj el Sovet-Unio deziras specialan traktadon pro la amplekso de ĉi regiono, pro la diverslingveco ktp. Do, ni petas la K-dojn sovetiajn, en ĉiu loko komisii gazetservanton, kiu senpere ekinterrilatu kun ni.

*

Aparte ni citu, ke nature nia "Esperanto-Servo" tute ne celas, malhelpi la "Labeskojn". La privata, kolektiva, grupa k. a. korespondadoj ne havas ion komunan kun la "Esperanto-Servo". Ja eĉ ni deziras, ke pli da K-doj okupu sin per kolektiva korespondado; konstante ni ricevas privatajn aŭ kolektivajn korespondaĵojn, kiujn nature ni ne povas respondi aparte. Pri tio ni rekomendas alvoki en *Sennaciulo* aŭ sendi al iu unuopulo, sed ne al nia "Esperanto-Servo". Ni estus malhelpataj en nia laboro, kiun ni plenumas kiel speciala fako de SAT.

*

Komisiu en ĉiu lingvoregiono unu reprezentanton de nia "Esperanto-Servo"! Nomon kaj adreson bonvolu komuniki al: *Esperanto-Servo*, Gerberstr. 24, *Leipzig C 1* (Germanio).

*

K-DO NATHANS PRI ESPERANTO

En julio aŭ aŭgusto nunjare okazos en Parizo la dujara kongreso de la Internacia Fakunuiĝa Federacio (Amsterdama). Jam nun K-do Nathans klopodas por akceptigi rezolucion priesperantan ĉe tiu kongreso. Kaj ni ĝoje konigas, ke li jam sukcesis voĉdonigi de la Holanda Fakunuiĝa Federacio suban rezolucion.

Unufojon pli ni gratulu al K-do Nathans pro lia esperantista fervoro kaj obstino. Espereble la aliaj laboristaj gvidantoj same komprenos, ke la sinceraj internaciistoj ne plu rajtas ignori la internacian lingvon.

LA KONGRESO DE LA INTERNACIA SINDIKATA FEDERACIO

Konstatinte la gravegajn malhelpojn, kiujn kaŭzas la lingva malsameco ĉu en la laboro de la internaciaj unuiĝoj, ĉu por la senpera reciproka interrilato de la diverslandaj laboristoj;

sciigante, ke la esperantistoj jam uzis la mondhelplingvon en multaj internaciaj kongresoj, ankaŭ en tiuj kun multnombraj diverslandaj delegitoj, plie en la korespondado, kaj ke ĝia uzado senĉese progresas,

petas la Estraron de la I. S. F. enketi aŭ enketigi per starigota komitato pri la ebleco kaj dezirindeco de la uzado de esperanto en nia internacia fakunuiĝa movado, publikigi la raporton pri tiu enketo kun konkludoj en 1928, por ke la venonta kongreso eventuale povu fari la necesajn aranĝojn por la enkonduko de la helplingvo.

*

La SAT-aparato servas

(Traduko de letero ricevita en Pskov)

Al Laborista Internacia Esperanto Korespondoficejo ĉe Gubernia Fako de SEU.

Karaj Kamaradoj!

Al unu el viaj esperantistoj, K-do Filimonov, mi la 23. XII. 26 okaze rakontis, ke en la jaro de 1919 ĉe remarŝo de urbo Riga[1]), lasis tie sian familion, kaj multfojaj provoj trovi ĝin estis sensukcesaj. Tiam K-do Filimonov proponis utiligi esperanton en tiu afero. Unuafoje mi aŭdis pri ekzisto de tia lingvo kaj ne kredis, ke per ĝi mi ricevos iajn sciigojn pri delonge-trovata[2]) familio, kiun mi serĉadis dum 8 jaroj. Kaj jen je mia granda ĝojo, la 3. I. 1927 mi ricevis leteron de K-do Filimonov pri tiu familio. Nun mi vidas, ke tie, kie helpis nek konatuloj, nek mia gepatra latva lingvo, okazis netaksebla servo de esperanto...

Mi alportas al vi persone, K-do Filimonov, dankon de patro, al kiu oni trovis lian familion kaj deziras pluan sukceson en via laboro kaj esperas, ke laborulaj amasoj uzos esperanton, kiel potencan ilon por interkompreniĝo je utilo kaj bono de l' proletaroj en la tuta mondo.

Laboristo-muldisto ĉe fabriko "Metalisto",
I. M. Zankeviĉ.

[1]) Evidente mankas kelkaj vortoj ĉi tie. — *Red.*
2) Perdita (?). — *Red.*

La 12-an de januaro, 1927, Pskov, ul. Lenina, d. n-o 13.

Subskribon de K-do Zankeviĉ certigas fabrika komitato, 12. I. 1927. Kopiis kaj tradukis *Sekretario de Gubfako de SEU, Filimonov.*

*

NIA POŜTO

L. Sleeton. — Bedaŭrinde vi eraras: estas nevere, ke "esp-o estas *ĉie oficiale* uzata en Sovetio". Sed eble utilus, se vi skribus mem al la koncerna instituto pri via propono. — *Red.*

7374. — Kial do vi ne turnas vin senpere al SEU? Ni miras, ke vi sendas al ni por publikigo tian peton. — *Red.*

Al Kelkiuj. — Ni ne rimarkis ian ŝanĝon, de kiam kalkulas la jarojn per la nombro 1927 anstataŭ per 1926. Racie la fakto estas do tute neatentinda. Ni ne estu sklavoj de malsaĝaj tradicioj. — *Red.*

Strasburga Grupo, K-do De Bruin k. a. — Ni sendis viajn "plendojn", al la "kulpuloj". Ni povus plenigi du paĝojn per tiaspeca materialo. Ne dependas de la SAT-aparato se la K-doj ne konsentas akurate ĝin uzadi. — *Red.*

7809—7811. — La rezolucioj de niaj kongresoj malpermesas al ni enkonduki en la SAT-vicoj la disputpunktojn, kiuj disigas nun la laboristan movadon. Pro tio ni ne povas publikigi vian proteston. — *Red.*

7349. — Respondon al via unua demando vi povas legi sur la lastaj paĝoj de la protokola kajero. Al via dua demando ni respondas, ke la gazeto pri kiu vi parolas estas burĝece neŭtrala.

4696. — Via anonco kostas 1,50 rubl. — *Adm.*

*

KRONIKO

Aŭstrio.

Salzburg. — Okazis la 25. I. 27 la jarkunveno de nia grupo kun ekspozicio de la grupaj biblioteko k. korespondaĵoj. Bedaŭrinde el la invititaj lab. organizoj venis nur 2 reprezentantoj: la estro de la sindikatara komisio k. la vicredaktoro de "Salzb. Wacht" (soc. dem. tagĵurnalo). La intereso de la partieminentuloj montriĝas nur per promesoj — dum estas instruataj senpage en la laborĉambro la angla k. itala lingvoj. Ĉiusemajna "Rubriko pri esp-o" funkcias. Aperis trad. el "S-ulo" "Blankaj mastroj — flavaj sklavoj". Nia membraro iom malpliiĝis, sed SAT-anaro kreskis! (Nun 12 parolkapablaj K-doj).
I. Reiter, Sekr.

Britio.

Bournemouth. — La soc. esp-istoj aranĝis 3 kursojn vesperajn dum-vintrajn, senpagajn por lab. simpatiantoj k. po 5 ŝ. por kurso por aliaj. — *H. Stay.*

Leeds. — Lastjare estis 1 SAT-ano, nun 8. Ni kunvenigos aŭg. aŭ sept. delegitojn de ĉiu lab.- k. sindikatgrupo de *Leeds* (estas pli ol 250) por sciigi ilin pri neceseco de esp. por Proletaro. Ankaŭ ni kunvenigos dumsomere lab. esp. geinstruantojn por diskuti plej bonajn instru-metodojn. — *Harry Burbey (7779).*

Manchester. — Dank' al K-dino *Dunn (4709)* k. aliaj K-doj, ni starigis esp.-lab.-klubon en *Manchester*, ĉe 114 Duke Street, Stretford Road. Kurso okazas merkr. vesp.; poste kunveno, paroladoj ktp. Antaŭe mankis

loko ĉi-tie por interparoli, propagandi k. varbi SAT-anojn. Ni forte deziras subtenon de ĉiuj SAT-anoj en *Manchestera* distrikto, ankaŭ vizitojn de K-doj el aliaj partoj de Britio k. de l' mondo. — *(4301.)*

Ĉeĥoslovakio.

Gablonz s. N. k. *Josefstalo.* — Okazis 9. I. 1927 en *Josefstalo* tutdistrikta lab-esp. kunveno; partoprenis 45 Gek-doj. K-do *Bauer (Gablonz)* mallonge parolis pri disvastiĝo de nia lingvo k. ĝia granda signifo por sennaciigo de l' Laboristaro. Sekvis raportoj el diversaj lokoj, kiuj montris, ke la geanaro en ĉi malgranda distrikto ĝojige kreskas. Krom la 2 asocioj ekzistantaj en *Gablonz* k. *Josefstalo* (sume 80 anoj, 15-SAT-anoj), ekfunkciis lastaŭtune 6 komenc-kursoj kun sume 95 gelern. Post la konferenco, ni propagandis per recitadoj, kantoj, ktp. k. finiĝis per kantado de l' "Internacio". Ekkoninte ilian propagand-valoron, ni decidis aranĝi similajn kunvenojn ĉiumonate. — *(6957.)*

Francio.

Paris. — Lastatempe "Fédération Espérantiste Ouvrière" (177, rue de Bagnolet, Paris XX-e) presigis 9 000-ekzemplere propagandan cirkuleron sendotan al la geinstruistaro de franclingvaj regionoj (Francio, Belgio kaj Svisio). En ĝi, F. E. O. instigas la geinstruistojn lerni esp-on per sia koresponda kurso. — La jara kongreso de F. E. O. okazos dum Pasko 1927 en la urbdomo de Ivry-sur-Seine, apud Parizo.

Germanio.

Chemnitz. — La 22.—23. I. 1927, okazis ĉi-tie distrikt-konferenco de LEA. Vizito bonega. La Chemnitz-anoj aranĝis salutvesperon per helpo de kantistoj, gimnastikuloj, biciklistoj, parol-ĥoro k. esp-istoj el Chemnitz. Ĉiuj klopodis prezenti la plej bonan. Reprezentantoj de la lab. organizoj KPD, SPD k. SAT deziris al nia movado bonan sukceson. La muzikistaro de la Ruĝfront-batalantoj bonvoleme interesigis la vesperon. — Dimanĉe okazis la laborkunsido. Partoprenis 70 ĝis 80 pers. K-do Münch kiel estro de la distrikto raportis pri sia laboro, farita dum la lasta jaro. Kvankam unuflanke novaj grupoj estiĝis, aliflanke li konstatis, ke pro div. kaŭzoj kelkaj pereis.

En la dua punkto parolis K-do Lerchner (Leipzig) pri la temo: "Kion celas SAT?". Dum sia preskaŭ hora parolado li demonstris al la Gek-doj la esencon k. valoron de SAT por la lab. esp-istoj. La aplaŭdo de la aŭskultantoj montris, ke ili konsentis al lia parolado k. la rezulto estis, ke kelkaj aliĝis k. abonis "S-ulo"-n.

Post la parolado de K-do L. oni pritraktis la asociajn aferojn, kiuj dum la lasta tempo konfliktis inter la LEA-estraro k. la redaktoro de "D. A. E.". La opinio estis, ke la redaktoro estas same anstataŭebla kiel alia estrarano. La asoci-estraro havas la fidon de la distriktanoj ĉar ĝi agis neŭtrale rilate politikajn tendencojn. Kiel distrikt-estron oni denove elektis K-don Münch, ankaŭ la kontrol-komitato estas reelektita. La sekvonta distrikt-konferenco okazos en Waldheim. — *J. Münch (578).*

Neckarsulm (Württ.). — Jan. 23. okazis la fondfesto de ĉi-tiea LEA-grupo (17 membroj). Efikis bone sur la ne-esp. ĉeestintojn la prezentaĵoj farataj parte en esp. de 3 junaj lern-inoj; ili prezentis poemojn perfekte elparolitajn k. korekte tradukis ilin germ.-en. Ĉeestis K-do *Scheel (Stuttgart),* kiu klarigis pri SAT kaj instigis aniĝon. Kelk. K-doj aliĝis, pluaj aliĝos. Estro de loka grupo: K-do *Fr. Rau,* Löwengasse 3, *Neckarsulm.* — *(1919.)*

Olbersdorf. — Ĉi-tiea SAT-grupo "Supren al lum" okazigis 15. I. 1927 la jar-kunvenon. Ĉeestis 14 Gek-doj, 4 gastoj. Post prezidanta salutparolado, ekmemoris K-do *Mälzer,* ke samtage antaŭ 8 jaroj, estis fimortigata K-do *K. Liebknecht* k. liahonore ni kantis "Fratoj al sun' libereco". Laŭ jara raporto de la sekr. (5783) la grupo je jarfino havis 19 anojn; 4 novuloj aniĝis, do la grupo nun nombriĝas po 23. Laŭ diversaj raportoj, la grupa vivo dum 1926 estis sufiĉe vigla; ĝi gvidas kursojn en: *Olbersdorf, Eichgraben* k. *Jonsdorf.* El la novaj Gek-doj aniĝis al SAT 19. Unuanime oni reelektis la estintan estraron k. kiel bibliotekiston K-don *Hentschel.* Du fervoruloj donacis al la grupo novan standardon. Kantado de l' "*Internacio*" finis la kunvenon. Ni presigis raportojn pri la kunveno en la "*Laborista Voĉo*" (kom.) k. "*Popolgazeto*" (soc.). — *(5795.)*

Orient-Saksio. — La unua kunveno de l' dua subdistrikto okazis jan. 29. en *Olbersdorf.* Ĉeestis 24 K-doj diverslokaj. Post kanto de "Fratoj al sun'", sub la unua tag-ord-punkto, la kunveno decidis, ke la *Olbersdorfa* grupo gvidu la subdistr. K-do *W.* estis elektata kiel estro. Sub dua punkto, estis akceptata konstanta raportado inter grupoj k. subdistr. K-do *G. (Hirschfelde)* raportis, ke inter la soc. junularo tiea fondiĝis esp-rondeto, 12 anoj k. esp.-kurso en lernejo komenciĝis 23. I. 27. K-do *Sch.* sciigis, ke li, por vigligi la distrikt-vivon, okazigos paroladojn pri ekonomi- kaj politikaj temoj, li parolas la 12. II. en *Seifhennersdorf* k. la 12. III. en *Olbersdorf.* La grupo *Somerau* aranĝos la 6. II. en *Wetzwalde* (Ĉeĥosl.) esp-ekspozicion. Estas konstateble, ke en la distr. multaj novaj anoj SAT-aniĝis. Sub diversaĵoj, K-do *Sch.* parolis pri t. n. neŭtraleco k. pri nia devo kiel revoluciaj sennaciuloj. K-do *G. (Seifhennersdorf)* estas elektita unuanime kiel delegoto al SAT-Kongreso en *Lyon.* Ĉiu membro el la subdistr. donacu por la *Jubileo-Ĉeno!* La dua kunveno estos la 15. IV. 27 en *Hirschfelde.* — *O. M. E. (5787).*

Jugoslavio.

S. H. S. Osijek. — Ĉi-tie estas fondita SAT-grupo, kun celo praktike realigi la 1-an artikolon de SAT-statuto. Koresp.-fako k. gazertserv.-fako prizorgas tradukadon el naci-gaz. por eksterlandaj lab-istoj k. el "S-ulo" por naci-gaz. La 10 jan. ni malfermis esp.-kurson por lab-istoj (35 lern.). — *(8333.)*

Sovetio.

Batum. — Ĉe la Centra Laborista Klubo estas organizita Esperanta Rondeto, konsistanta el 45 pers. Marde kaj vendrede K-do August Tanner gvidas esp.o-kurson kaj dimanĉe estas Rondetkunvenoj.

En Batum estas 29 SAT-anoj, varbitaj de K-do A. Tanner. Oni intencas organizi SAT-ĉelon. *SAT-ano* 5713.

Ĉita (Orient-Siberio). — Dum 1925 kaj 1926 okazis 80 kunsidoj de *Ĉita* SAT-grupo, kiuj havis grandegan edukan valoron por ĉiuj partoprenantoj kaj por disvolvo de praktika persp.a laboro. *Ĉita* estas vera forĝejo de SAT-aktivuloj, el kiuj kelkaj, forveturinte, iniciatis kaj progresigis SAT- kaj esp-movadon en aliaj lokoj de O-S. Pri la eduka laboro de nia grupo, jen la ĉefaj problemoj tagordaj de lastaj kunsidoj: Studado de "ABC de Sennaciismo" kaj de protokolo de VI-a Kongreso, diskutoj pri SAT-jarlibro por 1927, "Rilato de ‚S-ulo' al Ĉiniaj okazintaĵoj", Intern-labkor k. SAT-gazetservo k. pri "S-ulo". 8. III. 27 *Ĉita* SAT-grupo solenos 2-jaran ekziston k. petas ĉiujn siajn koresp-ojn kiuj ne ankoraŭ respondis, tion fari senprokraste. Adr.: *Ĉita, poŝtkesto N 1.*

Por partoprenigi Orient-Siber-esp-istojn en Tutmonda Statistikado k. por ricevi detalajn informojn pri esp-istaro Tut-Orient-Siberia, *Ĉita* SAT-grupo entreprenis tian statistikadon. La komisio skribis al pli ol 20 lokoj, ricevante respondojn el ĉie krom *Blagoveŝĉensk* k. *Petrovskij-Zavod* (malgraŭ ripetaj memorigoj!). Dum jan. kontrolo k. kompilo okazis k. la materialo estis sendata al statistik-fako de I. C. K., *Leipzig.* Evidentiĝis, ke en O-S (krom bedaŭrinde ne-respondintaj B. k. P-Z), troviĝas ĉ. 325 esp-istoj, 17 esp. organizoj, ĉ. 35 SAT-anoj k. 75 SEU-anoj. Dum 1926 ekzistas 32 esp-kursoj k. dum lastaj 5 jaroj ĉ. 70 kursoj. En diversaj urboj troviĝas 5 esp-bibliotekoj kun ĉ. 700 libroj. Plej bone la movado prosperas en *Ĉita* (ĉ. 150 pli-malpli bone scipovantaj esp-on, 17 SAT-anoj), *Vladivostok* (50 esp-istoj, 8 SAT-anoj), *Ĥaberovsk* (ĉ. 40 esp-istoj, 4 SAT-anoj), *Nikolsk-Ussurijsk* (25 esp-istoj, 5 SAT-anoj). Krome esp-rondoj troviĝas en *Verĥneudinsk, Ĥjolk* k. *Zilovo.* Izolaj esp-istoj troviĝas en pli ol 10 lokoj. Bedaŭrinde ne estas multaj SAT-anoj, sed notu, *nur* Gek-doj aktivaj k. bone-scipovanta la lingvon, trafas SAT-on. Ĉiuj esp-aktivuloj jam SAT-aniĝis k. la tuta movado en O-S. troviĝas sub gvidado de SAT-anoj. *(3717)*

Ivanovska vilaĝo (Orienta Siberio). — Aŭtune ĉi tien veturis K-do A. Borisoglebski (SAT-ano 4789). Nov. 13. 1926, en loka Lernejo por Kamparana Junularo (Ŝ. K. M.) li organizis esp. rondon; studas 57 gelern. 17—18 jarajn, el kiuj 77% "komsomolanoj" k. jun-pioniroj. Lecionoj okazas lunde k. sabate de 4—6 vespere. Jam estis 10 lecionoj. Rondanoj soifas aliĝi SAT-on. Ĉiuj estas infanoj de kamparanoj el 16 diversaj vilaĝoj ĉirk. *Ivanovka.* Salut-leteroj ricevitaj de japan-, hispan- k. anglaj SAT-anoj. Pluaj dezirataj! Ĉion adresu: *Ivanovka,* Amursk. okruga, Siberio, esp. rondeto ĉe Ŝ. K. M.

A. Borisoglebski (4789).

Kiev. — Nov. *Kiev*'a SEU-fako eldonis 10 000 ukrain-lingvajn tabel-kalendarojn por 1927 kun esp-gramatiko; jam vendiĝis 600 ekz-oj. La 2. I. en esp-ĉelo de 3-a k. 4-a ŝtatmuelejoj okazis soleno pro fino de l' kurso; finintojn salutis junkomunistoj k. SEU-organizoj. Dum malfermo por vintro de Petrovka Junkomunista Klubo, K-do *Vail* tralegis leterojn de K-doj *Adamson, Barthelmess* k. el Wien XI, sekve por esp-rondo enskribiĝis 10 personoj. Ĉe Presejo Lenin funkcias esp-grupo el junpioniroj, gvid. K-do *Zaika B.* Esp-grupo de 80-a lernejo aranĝis ekspozicion en junpionira Klubo, pri sia intern. koresp. k. bone propagandas. Ĉe klubo de fervoja administrejo spontane fondiĝis esp-grupo; gvid. K-do *Ivanov.* *(728)*

Nadejdino. — En lernejo II-ŝtupa lernas esp-on la tuta gelern. *Gvid. J. Oborotov.* *(5695)*

Odessa. — Esp. estas instruata en lernejoj, kluboj k. fabrikoj (8 kursoj kun 158 gelern.). LA SAT-grupo konsistas el 23 anoj. Antaŭnelonge ni profitis okazon de l' vizito de Gek-doj Yelland al nia infan-kolonio (2500 inf.) por organizi tie esp.-rondeton k. starigis sukcesan kunvenon kun radi-koncerto. Ĉeestis 400 inf. Rezulte, provrondeto, kiun partopreni multaj deziras. Estraro promesis, se unua rondeto sukcesos, enkonduki esp-on grandskale en ĉiuj super-klasoj. Nun necesas aranĝi mondkoresp-on por la provrondo. Gvidanto: K-do *S. Gelrud,* Knijnij pereulok n-o 3, *Odessa. Instrukcia sekcio de Odessa SEU-filio.* *E. G. (6309).*

Smolensk. — Jen ciferoj pri disvastigo de esp. en Smolensk'a gubernio:

Dato	Gub.-lokoj, kie est. esp-istoj	Nombro d. SAT-anoj	Nombro d. SEU-anoj
1. 1. 1925	1	2	3
1. 10. 1926	9	14	27
1. 1. 1927	11	32	80

Dum okt.-dec. 1926, estis disvastigitaj en la gub. 1462 ekz. de esp. lerno-, lego- k. agit-libroj. Ekzistas 44 esp-kursoj (986 lern., el kiuj 44,6% gelern., 28% oficistoj, 15,7% manlaboristoj k. ceteraj ruĝarme- k. kampar-anoj). Dum la unua jaro (1925) *Smolensk*'a esp-istaro ricevis almenaŭ 2672 leterojn el 27 landoj k.-dum okt.-dec. 650, pli ol duono presigita en lokaj ĵurnaloj. Antaŭnelonge *Smolensk*'a SAT- k. SEU-organizoj festis unujaran jubileon. 29—30-an jan. ĝi festis sian unuan gubernian esp-istan konferencon. La jubile-solenon k. amuzvesperon ĉeestis ĉ. 700 personoj. Alvenis 22 salut-leteroj k. telegramoj. Buŝe salutis esp-istaron reprezentantoj de loka kompartio, komjunularo, sindikatoj, ruĝarme-komandantaro, 2 redakcioj, societo "For analfabetecon", IRH., ktp. Loka ĵurnalo "*Laborista Vojo*" dediĉis al la jubileo duonpaĝon k. presis pri ĝi ĉef-artikolon k. esp-lingvan saluton: "Al *Smolenska* esperantistaro ni sendas fratecan gratulon okaze de ilia jarjubileo." Dum la fest-kunveno estis kolektitaj por SAT-Jubileo-Ĉeno 15 rubl.

(5241)

Usono

Denver (Kolorado). — Fine mi sukcesis organizi gelab. grupon tie ĉi, nome "Lab. Esp. grupo n-o 1". Ĝi ekfunkciis ĉi-jan. Estas 10 anoj kunvenantaj dufoje semajne en privata domo. SAT-ano 1781 gvidas la kurson k. ni uzas la libron "Petro". *J. M. Kerr.*

Lompoc (Kalifornio). — En ĉi urbeto K-do *Parley P. Christensen* paroladis antaŭ la urbkunveno pri neceseco de esp. k. per lia influo formiĝis kelkaj klasoj bone vizitataj.

New York. — Dec. 26 la Lab. Infanlernejo festis en Queens Labor Lyceum; direktoro *Reichert* substrekis necesecon al laboristinfanoj instrui esp-on, kiun faras K-do *M. N. Brown.* Jan 1. la Ferrera Moderna Lernejo de Yorkville kunveniĝis milope en la Labora Templo. La elektita de la gepratroj paroladisto *Eugen Miller* akcentis, ke esp-o estas same necesa scio kiel historio k. ekonomio por Laboristaro. La instruisto, K-do *Klaĝin*, montris n-on de "*Molodij Bilŝovik*", *Kiev*, en kiu estas foto de salutletero ĉi-tie sendita, ankaŭ prezentis 7-jarulon *Baker*, el la 1-a klaso, kiu ricevis p. k. de 9-jarulo sovetlanda invitanta koresp. La feston ĉeestis 2 branĉ-lernejoj, Pioniroj de Yorkville, germ. junulara grupo Migrobirdoj, Naturamikoj k. germ. lab. kanthoro Uthman. La *New Yorker "Volkszeitung"* recenzis laŭde la feston. — Kaj ŝajnas, ke oni tute forgesis paroli pri SAT. — *Red.*

*

Ĉe la Neŭtraluloj.

PASKA KONFERENCO EN PRAHA

okazos sub la patronado de *Internacia Eduka Oficejo*, kies sidejo estas en Ĝenevo Programo: 1) Raporto pri ĉio jam provita en lernejoj por alproksimigi la popolojn; 2) Scienca studado de la malfaciloj aŭ baroj al tiaj klopodoj kaj de la psikologia aŭ socia deveno de tiuj baroj, renkontitaj sur la vojo; 3) Diskuto pri praktikaj proponoj, interalie la disvastigo de interlerneja korespondado.

VIII-a BRAZILA ESPERANTO-KONGRESO

okazis en Victoria, ĉefurbo de ŝtato Espirito Santo, sub honora prezido de la Prezidanto de la ŝtato. La ministro de publikaj laboroj permesis la senpagan telegrafadon pri la kongreso kaj la ministro de interno pagis la vojaĝelspezojn de la kongresanoj. Ĉiaspecaj altranguloj morale subtenis la kongreson. La solena malfermo okazis en la luksa salono de la ŝtata parlamento. (Laŭ "Heroldo de Esperanto".)

*

PROVO DE TEKNIKA INSTRUADO PER ESPERANTO

Speciala Lernejo por Inĝenierarto, Domkonstruado kaj Industrio en Parizo pretas disvastigi eksterlanden tiun instruadon, profite al esperantistaj teknikistoj kaj inĝenierlernantoj. Por komenci, ĝi komisiis kelke da kompetentaj esperantistoj por traduki ĝian tutmonde ŝatatan kurson pri "Armbetono", kun ekzercoj kaj korektoj. Por certigi la sukceson de tiu entrepreno, grava por la esperanta movado, necesas, ke ĉiu interesato sciigu sian aprobon per poŝtkarto. Adreso: S-ro Direktoro de "Ecole spéciale des Travaux publics", 3, rue Thénard Paris (V-a).

*



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Nova Afriko de Th. Monnens, S. J. Esperantigis Floriano; eldonis "Espero Katolika", 55, rue de Vaugirard, *Paris* (VI-a). Formato: 15×10 cm. 24 pĝ. Prezo: 1.50 fr. fr.

Tia verketo indus troviĝi en la Biblioteko de SAT. Mi ne ŝercas: ĝi entenas multe da faktoj, kiujn devus koni ĉiu laboristo por trafe kontraŭbatali la kapitalistan reĝimon kaj... la religion! En pli konciza formo ne estas eble rakonti trafe pri la sklav-komerco kaj kruelaĵoj faritaj de blankhaŭtuloj kontraŭ negroj — kaj estas konfesite, ke nun ne progresas la katolikismo inter la negroj, sed la islamo! (42 milionoj da islamanoj). La aŭtoro ĉagrene demandas: "Ĉu Afriko estos al Kristo aŭ al la Profeto?... Por niaj misiistoj estos terure peniga tasko venkigi la krucon."

Ĉe tia konstato oni sin demandas kiel povas inteligenta katoliko kredadi, ke lia religio estas didevena!...

Mi ja rekomendas al la liberpensuloj la broŝureton kiel valoran propagandilon. *E. L.*

Internacia lingvo esperanto kaj lernejo (ukrainlingve) de I. Izgur. Eldono de "La Nova Epoko". Formato 21,5×15,5 cm. 32 pĝ.

Tre bezona nunmomente ukrainlingva propagandilo, lerte verkita kaj celanta precipe la instruistajn mediojn. Multaj citaĵoj el sovetiaj gazetoj, opiniaro de "eminentuloj", teksto de la ĝeneva deklaracio de instruistoj kaj mallonga esperanta gramatiko kompletigas la verkon de K-do Izgur, kies laboro meritas dankon de ukrainiaj esp-istoj.

Ereto.

Kuzeto, scena bagatelaĵo en unu akto de M. Balucki elpoligita de S. Greenkamp. Eldono: "Esperantista Voĉo". Formato: 18×13 cm. 16 pĝ. Prezo: 0.25 sv. fr.

Tre sprita komedieto en kiu (feliĉe!) malbono ne estas punata kaj moraleco ne ĉiam kontentigos bontemplanojn. Ĝi estas facile ludebla dum esperantaj vesperoj bezonante simplan ĉambran dekoracion kaj nur tri aktorojn (du viroj kaj virino). La aŭdantaron ĝi ne instruos, tamen amuzos. Des pli bone!

La traduko estas tute bona. *Ereto.*

Novaj amaj poemoj de Jaume Grau Casas, L. K. Barcelona 1927. Formato: 14,5×21,5 cm. 32 pĝ. Prezo ne montrita.

Simpatia kaj bela kolekto de amversaĵoj.

S. G.-K.

Esperanto durch Sprechen, 1. Teil: Einführung in Sprachlehre und Wortbildung de Prof. Dr. Göhl, Deutsch-Esperanto-Bücherei Nr. 12. Eldonejo: Ellersiek & Borel, G. m. b. H., Berlin und Dresden. Formato: 12,5×18,5 cm. 84 pĝ. Prezo: 1.20 mk. g.

La aŭtoro estas jam konata kiel verkisto de multaj german-esp-aj lernolibroj kaj gramatikoj, do estas superflue rekomendi la novan libron. *S. K.*

*

La Lingva Angulo

Demandoj:

1) En diversaj esperantaj tekstoj oni povas legi jene: Proletoj *DE* ĉiuj landoj; proletoj *EL* ĉiuj landoj; ĉiulandaj proletoj. *Kiu formo estas korekta?*

2) En la artikolo ("S-ulo" n-o 113) "La fantomo de nacieco" troviĝas la vorto "tribestro". Mi traserĉis ĉiujn miajn esp.-vortarojn, sed ne povis trovi tiun vorton. Fine mi serĉis en franca-norvega vortaro, kaj trovis la vorton "tribu" = *"gento".*

Ĉu necesas tiu nova vorto? *(6971)*

3) Oni tre ofte legas eĉ en la fundamentaj skribaĵoj: "Mi dankas vin por...". Ĉu ne estus preferinde skribi: "Mi dankas vin pro...", la prepozicio por *esprimanta la celon kaj ne la motivon?*

Respondoj:

1) La tri esprimoj estas egale korektaj kaj egale bonaj. Vi eĉ povas ankaŭ uzi la kvaran esprimon "Proletoj *en* ĉiuj landoj", kiu estas egale korekta kaj egale bona. Ĝenerale la 4 esprimoj estas sendiference uzeblaj; nur en maloftaj okazoj, por montri negravajn nuancojn, iu aŭ alia esprimo estas preferinda.

2) La vorto TRIBO estas enkondukita de Zamenhof; ĝi signifas: subdivido de iu popolo (ordinare sovaĝa aŭ malmulte civilizita), popolero, familiaro. Ekz.: "La dekdu triboj de Izraelo". Angle: tribe, clan; germ.: Stamm, Völkchen; fr.: tribu, clan; ital.: tribù; hisp.: tribu.

Ĉar tiu ĉi vorto estas samsignifa kiel GENTO, ĝi estas tute senutila kaj nenecesa.

3) Kvankam la esprimo DANKI POR estas Zamenhofa, ĝi ne estas rekomendinda, ĉar ĝi ne estas logike konforma al la ĝusta signifo de la prepozicio POR. Mi senhezite konsilas al vi uzi la prepozicion PRO post la verbo DANKI. Mi mem uzas nur ĝin en tiu ĉi okazo. *Fakulo.*

*

Ankoraŭ pri "radio" aŭ "Radio"

a) *Principo de internacieco:* **Prononcado:** France Radjó, ruse Rádjo, pole Rádjo, angle Ŭájrles, germane Funk (en angla kaj germana lingvoj la vorto Radio estas mal-

ofte uzata). **Ortografio:** En ĉiuj al mi konataj lingvoj oni skribas *Radio.* b) *Lingva tradicio*: Ĝis nun en ĉiuj esperantaj ĵurnaloj kaj speciale en la "Internacia Radio-Revuo" estis uzata nur la formo *Radio.* c) *Logikeco:* Principe anonimoj estu evitataj. Tamen esperanto estas vivanta lingvo, do — ne absolute logika. La anonimoj en ĝi estas multaj (ero, aro, in-tima, er-aro, kata-logo ktp.), tamen la kunteksto ĉiam permesas diveni la ĝustan sencon. *Konkludo:* Mi preferas la formon *Radio* ĉar en ĉiuj ĉefaj lingvoj ĝi estas tiel skribata (kaj esperanto estas dume pli skribata ol parolata en internaciaj rilatoj), ĉar tiu ĉi formo estas jam uzata de ĉiuj esperantistoj kaj ĉar nenia dubo eblas.

Internacia Sekretario de la Internacia Radio-Asocio: *E. Aisberg.*

*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo".

De Roode Vaan, Bruselo, 8. 1. 27: "El Blankrusio" (116). — *Bournemouth Times,* Bournemouth, 13. 11. 26: "Ĉe la Neŭtraluloj" (110), 30. 10. 26: Alvoko de D-ro Dieterle, 4. 12. 26: "Helena Respubliko" (113). — *Krasnoarmejskaja Pravda,* Smolensk, 20. 1. 27: "Blankaj mastroj — flavaj sklavoj" (119). — *Tverskaja pravda,* Tver, 28. 12. 26: "Kion mi travivis sur la vojo al USSR." (112), 11. 1. 27: "En malliberejo de Lodz" (114) k. "Letero el Bulgario" (112). — *Neue Zeitung,* München, 19. 1. 27: "La SAT-aparato servu!" (119—120). — *Social-Demokraten,* Oslo, 6. 1. 27: "La social-demokrata movado en Aŭstrio" (115). — *Norges Komunistblad,* ?, 6. 1. 27: "Kio okazas en Nederlanda Hindio?" (117), 17. 1. 27: "Blankaj mastroj — flavaj sklavoj" (119). — *Revista Popular,* Cordoba, 15. 1. 27: Bildo pri eksterlandaj kapitalistoj en Ĉinio. — *Prukopnik Svobody,* Vidin, 12. ?. 26: "Funebra Festo en Soveta Turkmenio" (107), "Prostitucio kaj Proletaro" (90). — *Le Combat,* Bruselo, jan. 1927: (Kompilaĵo el 117 k. 118).

Enhavis notojn pri SAT.

Le Cri du Peuple, Lyon, 22. 1. 27: Pri VII-a kongreso. — *Pskovsky Nabat,* Pskov, n-o 179: Pri VI-a kongreso. — *La Voix des Femmes,* Paris, 3. 2. 27. — *Le Progres,* Lyon, 4. 2. 27: pri VII-a kongreso.

Enhavis Tradukaĵojn el esperantaj leteroj.

Pskovskij Nabat, Pskov, n-oj 182, 190, 196, 212, 262 de 1926 j., n-o 6 de 1927 j. — *Za Mir i Trud,* Rostov, 8. 1. 27 k. 11. 1. 27, (4). — *Bolŝevistkaja Smena,* Rostov, 15. 1. 27. — *Do novogo sela,* Krivoj Rog, 5. 1. 27, 8. 1. 27. — *Murgazeto de Gubterfako "Interfratiĝo",* Pskov, n-o 12, (3). — *Leninskaja Gvardia,* Pskov, n-oj 34, 42. — *Pskova Plugisto,* Pskov, 19. 11. 26. — *Pskovskij Paharj,* Pskov, n-o 46. — *Krasnij Voin,* Moskvo, (2). — *Tverskaja pravda,* Tver, 8. 12. 26, (3), 4. 1. 27, (2), 12. 1. 27. — *Arbeiter-Zeitung,* Leipzig, 24. 1. 27. — *The Labour Woman,* London, 1. 1. 27, 1. 2. 27. — *Raboĉij Putj,* Smolensk, 16. 12. 26, 16. 1. 27, (29). — *Krasnoarmejskaja Pravda,* Smolensk, (22). — *Junij Tovariŝĉ,* Smolensk, (3). — *Junij Pioner,* Smolensk, (2). — *Smolenskaja Derevnja,* Smolensk, (4). — *Krasnaja Zvezda,* Leningrad, (3). — *Krasnoarmejskaja Zvezda,* Novo-Nikolajevsk, (8). — *Le Cri du Peuple,* Lyon, 29. 1. 27.

Enhavis priesperantajn artikolojn.

Molodij Bilŝovik, Kiev, 6. 1. 27, 16. 1. 27: leciono k. artikolo de E. Adamson, 20. 1. 27. — *Pskovsky Nabat,* Pskov, n-o 252, 1926 j. — *Bournemouth Times,* Bournemouth, 27. 11. 26: trad. de *Internacia Radio Revuo.* — *Krasnaja Zvezda.* — *Krasnij Voin,* Moskvo, 28. 11. 26. — *Tverskaja pravda,* Tver, 7. 12. 26, 8. 12. 26, 4. 1. 27, 11. 1. 27. — *Promién,* Lublin, ?, 2 propagandart. k. leciono. — *The Daily Herald,* London, intermite artikoletoj de M. Starr. — *Krasnoarmejskaja Pravda,* Smolensk, 16. 12. 26, 16. 1. 27, (3). — *Raboĉij Putj,* Smolensk, ?, (12). — Laborist-*Kamp-Korespondanto,* ?, (1). — *Krasnoarmejec,* Samara, (1). — *Proletarskij Puti,* Uljanovsk, (1). — *Krasnaja Zvezda,* Moskvo, (2). — *Putj Rabkora,* Rostov, (1). — *Za Mir i Trud,* Rostov, (1). — *La Protesta,* Buenos Aires, 8. 12. 26. — *Lyon Republicain,* 4. 2. 27. — *Bulletin d'Information de l'I.T.F.,* Amsterdam, jan. 1927. — *Le Combat,* Bruselo, jan. 1927: alvoko lerni.

Enhavas materialojn de SAT-gazetservo.

Krasnoarmejskaja Pravda, Smolensk, jan. — *Raboĉij Putj,* Smolensk, 2 n-oj. — *Junij Tovariŝĉ,* Smolensk, 1 n-o.

Disaŭdigis Radio-Stacioj.

Tvera Radio-Stacio *Pzerjinskij* regule disaŭdigis trad-aĵojn el leteroj k. art., i. a. "Baloto en Hungario" (116).

★ DIVERSAĴOJ ★

Virinoj helpu!

La Virinfako de la Labora Partio britia kongresos ĉe la Urbdomo, Huddersfield, 11.—12. majo 1927. (Korespondantinoj de *"Labour Woman"* bonvolu sendi salutojn senpere al la Kongreso).

Speciala propagando aranĝiĝis por la monato junio, en kiu multe da virinaj manifestacioj okazos.

*

Dnepropetrovska (Ekaterinoslava) Oficejo por Internacia Korespondado

serĉas regulajn koresp-antojn precipe inter Laboristaro (kolektivan aŭ personan) el ĉ. landoj pri jenaj demandoj: ĉiutaga lab. vivo, profesia, politika k. ekonomia stato de landoj, kom. k. kom-junulara movadoj, partiaj demandoj, intern. ruĝa helpo (IRH.), sporto, radio-amatoreco, lab. kluboj, tekniko, arto, literaturo ktp.

Ĉiujn koresp-aĵojn oni utiligos por lokaj gazetoj k. por kolekt. interkoresp-ado kun fabrikaj kolektivoj. Al ĉ. sendantoj ni garantias resp. Oni ankaŭ akceptas por interŝ. gazetojn (esp.-naciaj), librojn, afiŝojn ktp. — Koresp-aĵojn sendu al: *Esperanto-Komitato de SEU,* (por Labesko), str. K. Markso, 98, loĝ. 11, *Dnepropetrovsk,* Ukrainio (Sovet-Unio.)

*

Helpu!

Mi estas profesoro de fiziko, kemio kaj de metodiko de matematika kaj naturscienca instruado ĉe la Krasnoarsk-a Pedagogia Teknikumo. — Mi aranĝis esp. rondeton el la lernantoj de la Pedteknikumo, estontaj instruistoj de unuagradaj lernejoj. Se la eksterlandaj SAT-anoj deziras helpi al la esp. kaj SAT-movadoj inter siberiaj instruistoj kaj lernantoj, ili bonvolu komenci koresp-adon kun la ĵus nomita esp. rondeto. Mi mem zorgos pri akurata respondo flanke de la studentoj de la Pedagogia Teknikumo. Adr.: K-do *Romano Frenkel,* Pedteknikum, *Krasnojarsk* (Sovetio).



ALVOKO

La Laborista Esperanto-Klubo Glasgova aranĝas propagandveson, aŭ ekspoziciaĵon. Ĉio estos de aprilo. Ni petas al ĉiuj Gek-doj, rondoj, aŭ grupoj el la tuta mondo, ke ili sendu salutleteron, poŝtkarton, aŭ ekspoziciaĵon. Ĉio estos kompencata. Sendu al K-dino *Ruby Callery,* 288 Springburn Road, *Glasgow* (Scotland).

Ĉiuj Gek-doj jam SAT-aniĝintaj en Ĉita, re-SAT-aniĝu por 1927 j.

Depost la komenco de la SAT-movado en *Ĉita,* diverstempe SAT-aniĝis ĉirkaŭ 30 Gek-doj. Poste, multaj el ili forveturis al diversaj lokoj kaj kelke da ili, *bedaŭrinde,* ne re-SAT-aniĝis, ĉu pro tio, ke restinte izolaj, ili ne havis sufiĉe da aktiveco aŭ simple forgesis pagi la kotizon, ĉu pro tio, ke estante senlaboruloj aŭ ruĝarmeanoj, ili ne havis monon por pagi, ĉu pro iuj aliaj kaŭzoj.

Konsiderinte tion, *Ĉita*'a SAT-Grupo, dum sia kunsido de 16. 1. 27 decidis: *Nek unu K-do,* iam ajn SAT-aniĝinta en *Ĉita,* kaj poste ne-re-SAT-aniĝinta, denun *restu ekster SAT!* Ni konservu por SAT *ĉiujn* niajn membrojn, iam ajn aliĝintajn al SAT en *Ĉita,* kaj troviĝantajn nun ie ajn!

Ĉar ni havas la adresojn de preskaŭ ĉiuj niaj estintaj SAT-K-doj, ni decidis senprokraste, *instigi ĉiujn Gek-dojn* nepre realiĝi al SAT por 1927 j. Eble kelkaj K-doj (senlaboruloj, ruĝarmeanoj) ne havas rimedojn por pagi kotizon al SAT. Ne gravas! La grupo decidis, ke ĝi mem pagos SAT-kotizojn por ĉiuj, kiuj ne povas tion mem fari. Do, estu nia signaldiro: *Ĉiuj* niaj Gek-doj *devas* re-SAT-aniĝi, *malgraŭ ĉio!*

Tio estas nia modesta donaco al SAT. Ni opinias, ke *ĉiuj SAT-rondoj devas fari la samon,* rilate al siaj ne-re-SAT-aniĝintaj gek-doj troviĝantaj ie ajn. *Ĉu ne?*

Ĉita'a SAT-grupo.

Gekamaradoj, atentu!

Ivanovo-Voznesenskaj SAT-aninoj alvokas ĉiulandajn Gek-dojn sendi informojn pri nuntempa virina movado kaj situacio en industrio, socia kaj hejma vivo. La sciigoj ne devas esti tro ampleksaj kaj detalaj, sed precizaj. Ankaŭ ilustraĵoj kaj fotaĵoj estas necesaj. La informoj estas bezonataj por speciala n-o de nia loka ĵurnalo, dediĉota al *Internacia Tago de l' Virino,* la 8-an de marto.

Sendu leterojn pri via vivo kaj batalo.

Adreso: *Ivanovo-Voznesensk* (Sovet-Unio), Str. Baturina n-o 6, loĝ. 31, al K-dino *A. Medvedeva.*

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

K-do *Theodor Maller,* Hernalser Hauptstr. 58, II/7. *Wien, XVII.* dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *M. Fischer,* Franzensbrückenstr. 14, *Wien, II/1.* dez. interŝ. PM k. Sovetio, Mongolio, peco kontraŭ peco aŭ laŭ katalogo.

Britio.

— Gek-doj k. alilanduloj, kiuj vizitos Anglion, bonv. informi la sekretarion de „Lab. Esp. Klubo", 114, Duke St., Stretford Rd., *Manchester* pri sia alveno.

Ĉeĥoslovakio.

K-do *K. Vanous, Luze,* dez. interŝ. PM. k. ĉ l. precipe kun Sovet-Unio.

Francio.

K-do *Ladislao Janka, 127,* Rue de College, *Roubaix,* (Nord) dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l. PK, PI, PM, bfl.

K-do *Robert Lannay,* 72, Rue de la None, *Saint Pierre des Corps,* (Indre et Loire) dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. 1. L, PK, PI. Resp. garantiata.

Germanio.

K-do *Bernhard Karge,* Priesterstr. 1, *Nowawes ĉe Berlin,* dez. interŝ. PI, bfl. k. ĉ. l. Certe resp.

K-do *Walter Schmidt,* Luisenstr. 15, *Nowawes ĉe Berlin* (24 j.), dez. interŝ. PI, bfl. k. ĉ. l. Tuj resp.

K-do *Fr. Kolodzinski,* Rottstr. 52, *Bochum i. W.,* dez. interŝ. PM, bfl. k. ĉ. l., nepre resp.

— Chemnitz-a amik-rondo, dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PK. Adr.: K-do *Max Heinzmann,* Bernsdorfer Str. 143, II. *Chemnitz i. S.*

K-do *Fritz Wiesemann,* Brünningstr. 13, *Essen,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PK, PI.

— Gelernantoj dez. koresp. pri div. temoj, k. ĉ. l. L, PK, PI. Certe resp. Adr.: *Esperanto Kurso,* Gasthof Greissl, *Erding i. Bay.*

K-do *Erich Bemmann, Altmittweida, Nr. 144, B. i. S.,* dez. koresp. k. ĉ. l. L, PI, bfl. Resp. garantiata.

K-do Hans Ross, Beim Waisenhaus, 2, II. Rostock, dez. koresp. kun gejunuloj pri ĉ. temoj.

K-do *Wilko Wege,* Grünstr. 13, ptr. *Halle a. S.,* dez. el ĉ. l. unu ekz. de ĉ. gazetoj pri vegetarismo, korpkulturo. Ĉiu sendonto ricev. germ. gazetojn.

— Kiu korespondus k. ludus ŝakon kun mi? Resp. garantiata. Adr.: K-do *Kurt Kuchinke, Grossröhrsdorf i. S.*

—Dresdena Industriregiono—Lea distrikto dankas pro ĉiuj alsendaĵoj. Ni estus tre dankaj, se K-doj el Ĉinio, Japanio, Turkio, Aŭstralio kaj Ameriko kompletigus nian distriktan ekspozicion per kelkaj alsendaĵoj. K-doj helpemaj bonvolu sendi ekspoziciaĵojn al K-do *P. Köckeritz* (77) Tharandter Str. 6. *Dresden-A. 28.*

— Porcelanistoj ĉiul., pref. USSR-anoj estas petataj kontakti kun ni. Adr.: "*Lab. Societo Esp.*" (Erich Endler), Herzogstr. 11, *Selb i. Bay.*

Hispanio.

K-do *A. Nadal,* Str. Morey, 35, *Palma de Mallorca,* interŝ. nur PM. k. ĉ. l. Certa k. tuja resp.

Jugoslavio.

S. H. S. Osijek. — Grupo de SAT-anoj (22—30 jaroj), dez. koresp. kun Gek-doj de ĉ. l. pri seriozaj temoj, precipe pri vivkondiĉoj kaj lab. movado. Adreso: *Milan Klem, Osijek,* ul 48 (vidu Kronikon).

(8333)

Litovio.

— Du instruistinoj, *T. Klupŝiene* k. *F. Prizgintaite, Lygumai,* Ŝiauliu apskr., dez. koresp. pri div. temoj, L, PK, PI, k. ĉ. l. Resp. garantiata.

Sovetio.

Fervoja lab. klubo je nomo de Vajner (USSR., *Sverdlovsk,* str. Karl Libkneĥt, 38) dez. koresp. L, PK, PI, esp-aĵoj k. ĉ. l. pri fervojaj teknikaj demandoj, pri viv- k. labormaniero de gefervojistaro, pri klubaj k. socialaj demandoj. Resp. garant. de kluba labinkor. Ankaŭ dez. apartan koresp. de kluba komencanta esp.-rondeto kun similaj eksterlandaj.

— Junaj kom-istoj dez. koresp. pri lab. vivo, komjunulmovado k. a. seriozaj temoj k. ĉ. l. Adr.: *Klubo de K. Libkneĥt* (por esper-rondeto), *Velij,* Pskova gub.

K-do *M. I. Smirnov,* Podgornaja, 22, *Kineŝma* (Iv. Voznes.) dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l.

K-do *Reznickij,* ul. Komunala, 6, *Lugansk,* komuno de lab. ĵurnalaro dez. ŝakludi. Kontraŭbatalu!

K-do *A. Stahurski,* ul. R. Luksemburg, 11, *Ludinovo* (Brjansk. gub., dez. koresp. pri radio-amatoreco k. a. temoj, interŝ. PM.

K-do *A. Kovalenko,* Boriĉev tok, 30, 2, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *M. Ĉernoglaz,* (komjunulo), Konstantinovska, 24, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l.

— Junkomunista ĉelo ĉe 3-a k. 4-a ŝtatmuelejoj, dez. koresp. prefere kun gekomistoj junul. aŭ ĉeloj k. ĉ. l. Adr.: K-do *Golovanevski,* Kreŝĉatikski pr. 3, 1-a, *Kiev.*

K-do *A. Kagan,* Vozdviĵenska, 12, 1, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *I. Popov,* G. K. Kraj, Taganroga okr., *Matveevo-Kurganskoe p. otd. pos. Marfino,* dez. koresp. pri agronomio, naturscienco k. religio k. ĉ. l.

K-do *A. Korŝunov,* Novouzenskaja, 119, *Saratov,* k. ĉ. l. Nepre resp.

K-do *G. Majorov,* Kontoro matersklada, *Dolinskaja,* Krivo-Rogsk. okr., dez. koresp. k. ĉ. l., L, PI.

— Kiu dez. interŝ. ilustr. gazetojn k. koresp. pri statistika-ekonomiaj temoj, sendu k. skribu al K-do *A. Jadlovker,* ul. Lenina, 26, *Velij,* Pskova gub. Resp. garantiata.

K-do *S. Libermann,* ul. Jukovskaja, 29, *Odessa,* dez. koresp. k. interŝ. gaz. k. ĵurn.

K-do *G. S. Kaletin,* 3-a rajono Golubinaja hejmo, 933, *Orenburg,* pri metodiko de ekskursia laboro k. bibliotekscienco. Resp. garantiata.

GEKNABOJ!

Korespondu kun grupo ĉe Odessa infana urbeto (kolonio, kie loĝas kaj edukiĝas 2500 infanoj). Respondo al ĉiu garantiata. USSR, *Odessa, 4 Stacio, Detgorodok.*

INVITO

La 27. II. la SAT-grupo en Solingen aranĝos la duonjaran konferencon por Rejnlando-Vestfalio, matene je la 10-a horo.

Grava Tagordo!

La saman tagon je la 15-a horo okazos proleta esp. soleno, kaj fondiĝo de SAT-junulargrupo. Ni atendas multnombran vizitadon. — Ĉiujn skribaĵojn sendu al: K-do *W. Schlüss,* Kreuzstr. 5, *Solingen i. Rhld.*

ĜUSTIGO

En la artikolo de K-do D. Sheriff, aperinta en la n-ro 121—122 de "S-ulo", enŝoviĝis eraro, kiu aliigas la sencon de frazo. Anstataŭ: "...La sovetideo estas *malkonvena* por Usono ..." devas esti: la sovetideo estas MALKOVRITA EN USONO.

ESPERANTA DISAŬDIGO

La 25. II. 1927, h. 23 M.E.T. ondlongeco: 400 m. forto: 2 kv., la Falun'a sendstacio (Svedio) disaŭdigos tuthoran esperanto-programon. La disaŭdigo estas iniciatita de la stacia estraro por konatigi la eksterlandan publikon pri la, je turisma vidpunkto, tre interesa provinco Dalekarlio. La programo konsistos el kantado, parolado kaj muzikado. Estas do necese, ke la eksterlandoj Gek-doj klopodu kapti la elsendaĵon kaj poste raporti al Falu Radioklubb, Falun (Svedio). Aliaj gazetoj bonvolu represi la sciigon. —

(19)

INSTRUISTOJ via gazeto estas INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)

Gazetabono: 2,50 mk. g.
Kotizo al TAGE: 0,50 mk. g.

Specimenon petu de **M. Goldberg,** Frohburger Str. 68, p., Leipzig S3 (Germ.)

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)